

1976 majo

69-a jaro

n-ro 845 (5)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando



Utilaj kontaktoj en Pekino

Vi trovos

ke multa spaco en ĉi tiu numero estas dediĉita al iuj estraraj iniciatoj por reformi la Centran Oficejon de UEA. Aperas ankaŭ ampleksa artikolo pri la interpretistoj en la Eŭropa Ekonomia Komunumaro kaj pluraj el niaj regulaj rubrikoj. Tamen, se ni devas ion elstarigi ĉi tie, ni dirus, ke la ĉefa trajto de ĉi tiu numero estas ĝiaj mezaj, nenumeritaj paĝoj, dediĉitaj al enketo pri ĉi tiu revuo. De la nombro de niaj legantoj, kiuj konsentos fari la vere ne tro grandan penon kaj respondi al la enketaj demandoj, de tio grandparte dependos la enhavo kaj aspekto de ĉi tiu revuo en la estonteco. Estas do de esenca graveco, ke al la enketo reagu kiel eble plej multe da legantoj. Tial ni jam nun antaŭdankas al ĉiuj legantoj, kiuj plenumos nian peton kaj resendos la enketilon.

Enhavo

- 81 Reorganizo de la Centra Oficejo de UEA: Signifa nova iniciato (H.R. Tonkin)
- 82 La nuna oficistaro de la Centra Oficejo de UEA
- 83 Novaj kunlaborantoj de UEA, Kunlaboro inter ILEI kaj UEA
- 84 Someraj Universitataj Kursoj: SUK trian fojon (csb)
- 85 La Estraro demandas: Ĉu Rotterdam estas la ĝusta urbo? (H.R. Tonkin)
- 86 Interpretistoj: Nemalhaveblaj en la Komunumaro (W. van de Walle; traduko de E.L.M. Wensing)
- 88 Eŭropa Esperanto-Kongreso: Kunlabora aranĝo, Rezolucio de la Eŭropa Esperanto-Kongreso
- 89 Opinioj: Eŭropaj kutimoj kaj la tutmondigo de Esperanto (Akiko Woessink-Nagata)
- 90 Leterkesto
- 91 TEJO-paĝo: Helpe bezonata! (Hans Bakker), Regiona agado de TEJO: Kuraĝigi izolulojn
- 92 Recenzoj ("Historieto de la japana Esperanto-movado", "Media malboniĝo en la mondo kaj rimedoj de civitanoj", "Hasanagaino")
- 93 Laste aperis. . . (novaj eldonaĵoj en la Internacia Lingvo)
- 94 Loke – Fake (mallongaj novaĵoj)
- 95 Oficiala informilo el la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, Ekzameno E (Bernard Golden)
- 96 Anoncetoj

La kovrilo

Survoje al Japanio, s-ro E.J. Woessink kaj lia edzino akceptis inviton de Ĉina Esperanto-Ligo halti en Pekino por kelktaga oficiala vizito. Ges-roj Woessink estas ankoraŭ en Japanio de kie ili sendis al ni la kovrilan bildon sur kiu videblas la vicprezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo, s-ro Je laiŝi (dekstre) al kiu s-ro Woessink transdonas donacon dum la oficiala bankedo, kiun la vicprezidanto de ĈEL aranĝis la 23an de aprilo. Ĉiuj ĉi detaloj aperis ankaŭ en la ĉefa pekina ĵurnalo ("Popola ĵurnalo") la 25an de aprilo 1976. Kvankam ni en unu el niaj sekvaj numeroj pli amplekse raportos pri la vizito al Pekino, jam nun necesas saluti la fakton, ke tia oficiala kontakto inter UEA kaj ĈEL entute okazis. Ĉu ĉi tiu kontakto signifas, ke UEA ĉesos pasive atendi, ke la demandoj pri kelkaj landaj movadoj (Ĉinio, Rumanio, Kubo) daŭre restu sen respondoj, anstataŭ ke la monda organizaĵo entreprenu aktivajn paŝojn por helpi pluan disvastigon de Esperanto en tiuj landoj kaj por ligi la tiean movadon kun la tutmonda?

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 19,25; Sud-Ameriko 16,50; Suda Afriko, Azio 13,75; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 11,— gld.

Anonctarifo: 1p. 500 gld. 1/2p. 265 gld., 1/4p. 145 gld., 1/8p. 85 gld., 1/16p. 55 gld. Ripetrabato 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estrararo de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro Humphrey R. Tonkin, 286 Iffley Road, Oxford OX4 4AA, Britio; tel. (0865) 47408.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Racławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (085) 137412.

Signifa nova iniciato

Raportante pri la lasta estrarkunsido (v. nian aprilan numeron, p. 61) ni nur menciis reorganizon de la Centra Oficejo de UEA. Ĉi tie la prezidanto de UEA larĝe eksplikas la estrarajn planojn pri la reorganizo de la ĉefa movada administrejo.

DUM SIA KUNSIDO en Rotterdam en aprilo, la Estraro de UEA elformulis kaj aprobis la bazan strategion, kiun la Asocio sekvas en la evoluigo de la Financa Programo, kiu celas akiri por la Esperanto-movado pli grandajn financajn rimedojn, interalie el ekster niaj rondoj, kaj kvantan plivastigon de la agado por Esperanto. La Estraro aŭdis kuraĝigan raporton pri la laboro farita kaj la sumoj jam kolektitaj. Ĉar la junia numero de la revuo estos ĉefe dediĉita al priskribo de la Financa Programo kaj raporto pri la ĝisnuna progreso, ni prokrastos la detalojn ĝis la venonta numero.

Sed la agado por la Financa Programo kaj la vastiĝo de aktivecoj, kiuj povus sekvi el ĝi, postulos plifortigon kaj renovigon de la centra administracio de la Asocio. Ankaŭ al tio la Estraro dediĉis multan atenton en sia aprila kunsido kaj venis al kelkaj gravegaj decidoj. Ilin ni prezentas ĉi tie.

Mankas tempo por krea laboro

La oficistaro de la Centra Oficejo regule kaj sindediĉe laboras por Esperanto kaj por la Asocio ne nur dum la kutimaj laborhoroj sed ankaŭ vespere, semajnfine: malofte la oficejo en Nieuwe Binnenweg estas malluma aŭ malplena. Tamen, la oficistoj ne povas ĉion fari. Neeviteble, ili prenis al si ĉefe la rutinajn taskojn — la librotenadon, produkton de cirkuleroj kaj eldonaĵoj, redaktadon, registradon de la membraro — taskojn esencajn al komplika asocio kiel la nia. Restas malmulta tempo por vere krea laboro — novaj informiloj, novaj kontaktoj kun aliaj organizoj, agado ĉe registaroj kaj instancoj, esplorado. Tio fariĝis tasko ekskluzive de la estraranoj kaj aliaj komisiitoj. Restas malmulta tempo ankaŭ por la komerca evoluigo de la Asocio — organizado de turismaj vojaĝoj, pliampleksigo de niaj kongresoj, novaj eldonaĵoj, ktp. Oni devas admiri la laboron ja faratan, sed samtempe konstati, ke por la sukcesigo de Esperanto ĝi ankoraŭ ne sufiĉas.

Feliĉe, en la pasintaj kelkaj monatoj novaj iniciatoj multe plifirmigis la administran pozicion de la Asocio. Unue, la fondiĝo de la Volontula Servo alportis novajn fortojn. Nuntempe du plentempaj volontuloj laboras en la Centra Oficejo, kaj pluraj aliaj dediĉas parton de sia tempo al laboroj en la kadro de la Volontula Servo ĉu ĉe la CO ĉu ekster ĝi. Due, la pli firma financa situacio ebligis al la Asocio aĉeton de dua kompostmaŝino. Rezulte, ne nur la CO havas sian kompostmaŝinon, sed ankaŭ ekde aprilo troviĝos dua

maŝino en Antverpeno, kie forta grupo de volontuloj laborigas ĝin ne nur por la agado de UEA sed ankaŭ komerce, je la profito de UEA kaj la loka Esperanto-grupo. Trie, la plivastigo de la rolo de la Komitato en la efektiva laboro de la Asocio, per starigo de komisionoj kaj elekto de komisiitoj pri specifaj taskoj, malŝarĝis la Centran Oficejon je pluraj taskoj kaj enplektis novajn fortojn. Sed en UEA de la estonteco tiuj kunlaborantoj bezonos ankoraŭ pli fortan, ankoraŭ pli iniciatokapablan administran aparaton.

La Financa Programo parte celos persvadi al eksteraj instancoj (universitatoj, esplorinstitutoj, komercaj entreprenoj) studi pli intense lingvajn problemojn kaj la solvon, kiun prezentas Esperanto. Ĝi ankaŭ celos atingi pli vastajn tavolojn de influaj homoj ekster la Esperanto-movado. Tiucele, ĝi necesigos bone poluritajn argumentojn, bonan informmaterialon, kaj la kreon de vera fonto de informoj ĉe UEA al kiu eksteruloj povu sin turni. Ĝi ankaŭ postulos eksterordinare altan nivelon de planado en la Esperanto-movado kaj klaran komprenon pri niaj ĉefaj taskoj. Jen la unua kampo sur kiu necesos plifortigi nian agadon.

Tiucele, la Estraro decidis provi apartigi kaj plivastigi du funkciojn kiujn nuntempe prizorgas la direktoro de la Centra Oficejo. Unuavice li gvidas la Centran Oficejon, certigas la bonan fluon de la laboro, prizorgas la Volontulan Servon. Sed samtempe d-ro Sadler estas unu el niaj plej imagopovaj informantoj, li prizorgas la preparon de informmaterialoj, pretigas la revuon de *CED La Monda Lingvo-Problemo* por la presejo, korespondas kun fakuloj kaj eminentuloj, respondecas pri la bona prizorgo de la Biblioteko Hodler. Neeviteble, la unua tasko rabas la atenton for de la dua.

Fako pri ĝenerala planado

La Estraro do decidis fondi novan fakon ĉe UEA, kiu respondecu pri la ĝenerala planado de la Asocio, la informado al eksteraj instancoj kaj la organizado de esplorkomisionoj. La planado inkluzivos kunordigon de niaj planoj kun tiuj de la landaj kaj fakaj asocioj, evoluigon de la diversaj kampanjoj de la Financa Programo, kaj konsiladon pri la plej efikaj vojoj irendaj fare de la Asocio. Sub informado ni komprenas ellaboron de novaj informmaterialoj, prizorgon de la teknika flanko de la informlaboro, kaj eltrovon de efikaj argumentoj. Sur la kampo de esplorado ni antaŭvidas ĉefe instigadon al eksteraj instancoj fari

tiajn esplorojn, helpadon al la diversaj institutoj kaj lektoratoj kiuj jam okupiĝas pri Esperanto en la diversaj landoj, kaj administradon de esplorprojektoj por eksteraj instancoj. Ni antaŭvidas plifortigon kaj ĝisdatigon de la Biblioteko Hodler, tiel ke ĝi fariĝu ne nur Esperanta biblioteko sed ankaŭ vera studa centro pri lingvaj problemoj kaj ilia solvado, kaj kvazaŭ la konsulta kerno de la laboro de CED. Se ni sukcesos liberigi lin de liaj aliaj taskoj, ni intencas peti al d-ro Sadler esti la unua gvidanto de tiu nova fako.

Kompreneble la sukceso de la fako pri planado multe dependos de nia kapablo logi al ĝi rimedojn el ekstere. Sed funda studado de la financaj eblecoj, kaj interne de la Asocio kaj ekster ĝi, konvinkis nin, ke tiu espero estas reala.

Samtempe ni serĉos novan stabanon kiu respondecu pri la tuta laboro de la Centra Oficejo — la administrado, la fluo de la taskoj, la dungado kaj prizorgado de la oficistoj kaj la anoj de la Volontula Servo. Tiu persono havos du aliajn ĉefajn funkciojn, ambaŭ iom novajn: la kunordigon de la laboro de UEA kun tiu de landaj kaj fakaj asocioj, por eviti duoblaĵojn kaj helpadi al aliaj asocioj; kaj la komercan evoluigon de la Asocio. Ĉi-lastata precipe koncernas la eltrovon de

novaj manieroj komerce enspezigi la Asocion — ekzemple per eldonaĵoj, vendado de varoj, reklamado.

La Movado profitu de la kongresoj

Por daŭrigi la modernigon de la Universalaj Kongresoj kaj por organizi turismajn eventojn kaj eventojn ĉirkaŭ la UK ankaŭ por la neesperantista publiko, la Estraro decidis restarigi la oficon de Konstanta Kongresa Sekretario. Dum la pasintaj kelkaj jaroj UEA restis sen KKS, kaj tiun taskon intertempe plenumis ĉefe d-ro Sadler. Sed malgraŭ lia vere elstara laboro, kiu eĉ plifortigis la kongresojn kelkrilate, estas klare, ke ni bezonas homon kiu povu ĉefe okupiĝi nur pri la kongresoj. Niaj kongresanoj pagas multon por ĉeesti niajn kongresojn — ne nur en la formo de kongreskotizoj kaj hotelaj pagoj, sed ankaŭ por vojaĝado. Indas, ke la profito el tiuj elspezoj fluu ĉiam ne al neesperantistaj instancoj sed al la Esperanto-movado. En kelkaj landoj tio jam okazas, sed la organizado de karavanoj al niaj kongresoj kaj apartaj turismaj eventoj povus esti multe pli vaste ekspluatata por helpi la progresigon de Esperanto. Same, niaj kongresoj venigas al la kongresurbo ĉiujare artistojn. Ni povus organizi por ili ankaŭ prezentojn antaŭ la neesperantista publiko, organizi kurs-

LA NUNA OFICISTARO DE LA CENTRA OFICEJO DE UEA:

Jan de Goeij, pensiulo nederlanda, laboras en la CO jam de la tempo, kiam ĝi unue translokiĝis al Rotterdam antaŭ pli ol 20 jaroj. Liaj taskoj inkluzivas administradon de *Kontakto*, registradon de la kongresaliĝoj, multobligadon, pakadon kaj ekspedadon.

Lawrence Mee venis al la CO el Britujo antaŭ 3 jaroj, post kariero de inĝeniero kaj sistem-desegnisto por komputiloj. Li funkciis kiel Kongresa Sekretario dum parto de 1973 kaj poste transprenis la librotenan fakon de UEA. Laste li helpas ankaŭ ĉe la presmaŝino.

Simo Milojević, jugoslavo, la redaktoro de *Esperanto*, estas samtempe la vicedirektoro de la CO kaj laŭbezzone okupas sin ankaŭ pri aliaj fakoj, precipe libroservo kaj la kongresoj. Antaŭ ol eklabori en la CO komence de 1974, li jam plurajn jarojn oficis en Nederlando; pli frue li estis redaktoro de *La suda stelo* kaj *Kontakto*.

Robert Moerbeek, nederlandano, jam sep jarojn kontroladas la presprovaĵojn de praktike ĉiuj eldonaĵoj de UEA, prizorgas la Bibliotekon Hodler kaj kunhelpas paki, afranki kaj ekspedi. Antaŭ ol dediĉi sin al UEA li studis klasikajn lingvojn kaj dum 6 jaroj instruis.

Nel Rietmulder, nederlandanino, lernis Esperanton speciale por labori en la CO, kie ŝi jam de 1968 respondecas pri la korespondarhivo, en- kaj el-kovertigas la poŝtaĵojn kaj tajpas adresojn. Lastatempe ŝi kunhelpas en la membro-administrado, fotokopiaj laboroj kaj administrado de la delegita reto.

Victor Sadler, la direktoro de la CO nuntempe agas ankaŭ kiel Kongresa Sekretario kaj ofset-fotografisto. Li venis al UEA post doktoriĝo pri fonetiko en Londono en 1962 kaj estis redaktoro aŭ ĉefredaktoro de *Esperanto* ĝis 1974 kaj redaktoro de *La monda lingvo-problemo* de 1968 ĝis 1974.

Sija van Wijngaarden fariĝis oficistino de UEA jam en 1957, do nelonge post la translokiĝo de la CO al ŝia hejmurbo Rotterdam. Ŝi respondecas pri la membro-administrado kaj praktike pri ĉiuj aliaj adresaroj, pri adresado kaj ekspedado de la revuo, jarlibro, *Kontakto* k.s.

Bruce Crisp estas juna kanadano, universitata diplomito, kiu servas en la kadro de la Volontula Servo ĝis aŭgusto 1976. Li komplete prizorgas la Libroservon kaj Abonservon de UEA. Post la fino de sia servo-periodo li revenos al instruista okupo en Montrealo.

Stefan MacGill alvenis en Rotterdam, por unujara servo kiel volontulo, nur en aprilo 1976, post longa marvojaĝo el Nov-Zelando kaj prelegvojaĝo tra Eŭropo. Li estis aktiva en la junulara movado en sia hejmlando kaj estas nuntempe estrarano de TEJO. En la CO li kompostas, tajpas, enpaĝigas — kaj akiras spertojn uzeblajn poste en la landa movado.

Sonoko Kuzume laboris en la eksporta fako de la firmo Nikon en Tokio antaŭ ol akompani sian edzon al Eŭropo por 4-jara deĵorperiodo. De post aŭgusto 1975 ŝi laboras kiel volontulo unu tagon semajne en la CO, precipe ĉe la kompostmaŝino.



Reorganizo de la Centra Oficejo: S-ro J. de Goeij kaj f-ino Sija van Wijngaarden jam du jardekojn laboras en la ĉefa movada administrejo.

ojn ĉirkaŭ la kongreso, organizi specialajn eventojn por la publiko. Ankaŭ tio produktos valorajn enspezojn, kaj estos natura tasko de nia novstila KKS.

Kaj de kie UEA akiros la monon por esence du novaj dungitoj? Unue, la ĝisnuna sukceso de la Financa Programo donos al ni sufiĉan spirospacon por ebligi portempan subvencion al la salajra konto. Due, ambaŭ oficoj (tiu de administra gvidanto kaj tiu de KKS) estas tiel antaŭvidataj, ke ili kreos almenaŭ parton de la enspezoj necesaj por subteni ilin. Similan celon havos ankaŭ nia nova fako pri planado, esplorado kaj informado.

Kaj ĉu tiu reorganizo ne implicas plicentrigon de la laboro, do la kontraŭon de la ĝisnuna politiko de decentrigo sekvata de la nuna Estraro? Verŝajne ne, ĉar la celo ne estas transpreni taskojn nun faratajn de volontuloj, sed ĝuste krei la kondiĉojn en kiuj la laboro de volontuloj povu plej facile evolui. La fako pri esplorado, ekzemple, ne transprenos taskojn nun en la manoj de volontuloj, sed liveros la necesan administran kaj organizan bazon por maksimumigi la okazojn por utiligi volontulan helpon. La decentrigo de unuopaj taskoj, iniciatita de la nuna Estraro, daŭros. Nia kapablo enkonduki la supremenciitajn ŝanĝojn dependos de du faktoroj: nia kapablo allogi al la Centra Oficejo la ĝustajn, taŭgajn homojn; kaj nia kapablo elteni finance la transiran periodon. Ni estas pli optimismaj pri la dua ol pri la unua demando. Sed sen kuraĝo oni nenion atingos. Sekve, vi trovos aliloke en tiu ĉi numero anoncojn pri la du novaj postenoj. Se bonaj kandidatoj prezentos sin, ni estos survoje al sukceso. La fruktoj de sukceso estos pli firma, pli laborkapabla kaj pli agadopreta UEA — evoluo kiun ni ĉiuj sopiras, kaj kiu estas interne de niaj kapabloj.

Humphrey R. Tonkin

NOVAJ KUNLABORANTOJ DE UEA:

Ian Jackson, juna brito kiu ekstudos pri juro en la Universitato de Cambridge en oktobro, aliĝis al la Volontula Servo en januaro. Li asistas al la Prezidanto en Britujo, ĉefe sur la kampoj de eksteraj rilatoj kaj ĝenerala administrado.

Ulrich Lins, doktoro pri historio de la Kolonja Universitato kaj redaktoro de *Esperanto en perspektivo*, eklaboris en januaro kiel komisiito pri eldona agado de UEA. Li konsilas al la Asocio pri novaj eldonaĵoj, prizorgas la trailegon de ricevitaĵoj manuskriptoj, kaj preparas tekstojn por eldonado. Helpas al li la konataj Esperanto-verkistoj **William Auld** kaj **Henri Vatré**.

Akiko Woessink-Nagata, iama redaktorino de la revuo *Esperanto*, redaktas la novan informbultenon pri UN kaj ties specialigitaj instancoj, inkluzive Uneskon. La bulteno, kiu estas eldonata de la Komisiono de UEA pri Eksteraj Rilatoj, nomiĝas *UN kaj Ni* kaj estas abonbla ĉe UEA kontraŭ 20,—gld. por dek numeroj. Petu provekzempleron ĉe la CO.

Paul Peeraerts, komitatano de UEA en Belgujo, prizorgas la novan kompostilon de UEA en Antverpeno, organizas la surlokajn helpantojn, kaj rilatas kun la CO pri teknikaj detaloj. Jam antaŭ livero de la kompostilo la laboro komenciĝis: la *Esperanto-dokumentoj* estas tajpataj en Antverpeno de liaj kunlaborantoj.

David Curtis estas kunlaboranto de la Esperanto-Influgrupo, kiu prizorgas la tre sukcesan parlamentan agadon en Britujo. Li nun redaktas novaĵleteron por parlamentaj agantoj en la diversaj landoj. La novaĵletero, kiun la Influgrupo eldonas por UEA, celas liveri aktualajn informojn kaj utilajn sugestojn pri metodiko en la parlamenta laboro. Por ricevi ekzempleron aŭ transdoni novaĵojn por *Esperanto-kuriero parlamenta*, skribu al s-ro David Curtis, 7 St Judes Terrace, Weston-super-Mare BS22 8HB, Britujo.

Kunlaboro inter ILEI kaj UEA

DUM LA EŬROPA Esperanto-Kongreso, meze de aprilo, en Eindhoven, Nederlando, okazis du kunsidoj inter reprezentantoj de la Estraro de UEA kaj reprezentantoj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Nome de UEA partoprenis la kunsidojn d-ro H.R. Tonkin kaj d-ro P. Denoël, dum ILEI estis reprezentita de s-ro H. Sonnabend kaj prof. d-ro M. Dazzini, kiuj estas la prezidanto kaj ĝenerala sekretario de la instruista organizaĵo. Dum la unua el tiuj kunsidoj estis atingita interkonsento pri restarigo de rilatoj inter la du organizaĵoj kaj pri repreno de aktiva kunlaboro surbaze de nova interkonsento, kiu nun iras al la kompetentaj organoj de la du organizoj por aprobo.

SUK trian fojon

DUM LA LASTAJ JAROJ oni de tempo al tempo aŭdis aŭ legis pri projektoj aŭ klopodoj, eĉ pri fondoj, de internaciaj universitatoj en diversaj lokoj. Ĉiam, kompreneble, estas menciita la maniero, laŭ kiu oni "solvos" la lingvan problemon en tia institucio. — La ekzistantaj universitatoj akceptas ankaŭ ĉiam pli multajn alilandajn studentojn. Denove aperas la lingva problemo.

Oni evidente ne povas atendi, ke iu universitato mem venos al la ideo malfermi kursojn por ĉiulandaj studentoj en la internacia lingvo. Tial grupo de klarvidaj homoj, sub gvido de prof. Natalis, kreis en Lieĝo, Belgujo, ĝermon de internacia universitato uzanta nur Esperanton por sia administrado kaj instruado. Ĝia nomo estas Someraj Universitataj Kursoj (SUK).

La celoj kuŝas en la ideo mem: enkonduki Esperanton en la universitatajn kaj sciencistajn mediojn kaj disponigi al studentoj fakajn kursojn per la lingvo internacia. Studento, kompreneble, lernas lingvon unuavice por uzi ĝin en kampo, kiu interesas lin. SUK volas ebligi al studentoj praktiki la lingvon kaj ĝui internaciajn kursojn, kiuj cetere kontribuas ankaŭ al interŝanĝado de spertoj inter fakuloj.


Sub la gvidado de prof. Natalis, emerita lekciisto ĉe la Universitato de Lieĝo, kun la helpo de d-ro Wim de Smet, André kaj Marie-Françoise Heck, Léon Hauregard, Uwe J. Moritz kaj d-ro P. Denoël, SUK fondiĝis en 1972 en la formo de asocio sen profita celo laŭ la belga juro. Tiu iniciato ricevis en tiu tempo neniom da subteno flanke de la cetera Esperanto-movado. Bazante sin nur sur la kotizoj de dudeko da membroj ĝi tamen la saman jaron organizis la unuan sesion de la Someraj Universitataj Kursoj.

La unua sesio okazis kompreneble en Lieĝo kaj havis du studdirektojn aŭ "fakultatojn": lingvistiko kaj medicinaj sciencoj. Pli ol 60 studentoj laboris tri semajnojn sub la gvidado de universitataj instruistoj diverslandaj. Tiu unua paŝo frape montris la problemojn de universitatnivelaĵ kursoj: manko de studlibroj, ne tre multnombraj altkvalifikitaj instruistoj, manko de apogo flanke de la gvidaj instancoj de la Esperanto-movado, neebleco kontakti tra la kutimaj kanaloj la koncernatan publikon, la seriozajn studemulojn.

Tamen la organizantoj ne malkuraĝiĝis. Post la morto de prof. Natalis la prezidantecon transprenis prof. C. Støp-Bowitz el la Universitato de Oslo. En 1974 okazis la dua sesio kun la studdirektoj biologio, kemio kaj socilingvistiko. Krom Instituto Hodler 68, kiu afable subvenciis ankaŭ tiun sesion, la ĝenerala Esperanto-movado mirige malmulte apogis la iniciaton, kaj oni devis atendi la trian sesion, kiu okazos en aŭgusto 1976, antaŭ ol UEA donis sian aŭspicion. Nun

serioze disvolviĝas la preparoj por la tria sesio, kun tri studdirektoj: biologio, matematiko, sociologio. I.a. pro ekonomiaj kialoj tiu sesio okazos en Antverpeno. Por ke ne perdiĝu la giganta laboro farata okaze de la sesioj, SUK eldonas la kursotekstojn verkitajn de la lekciistoj mem. Tiuj tekstoj estas gravega kontribuado al la scienca literaturo en Esperanto, kaj ĝis nun preskaŭ la sola. Jam elĉerpiĝis la kursotekstoj el 1972, kaj iom post iom vendiĝas ankaŭ la tekstoj el 1974. La relative malgranda eldonkvanto altigas la vendoprezojn (tamen la studentoj kaj la membroj de SUK rajtas ricevi rabaton). Sed esperantistoj interesigantaj pri la temoj farus kaj al si mem kaj al SUK valoran servon aĉetante la tekstojn.

SUK daŭrigas sian pioniran laboron sur la universitata kampo. Ĝi jam planas sesion en 1978, verŝajne kun la studdirektoj fiziko (aŭ matematiko), geologio (aŭ astronomio), kaj psikologio. Supozeble, ĝuste SUK reprezentas la vojon por penetrigi Esperanton en la universitatajn kaj sciencistajn mediojn.



Antverpeno: Longa movada tradicio en la pasinteco kaj vigla aktiveco en la nuna tempo.

Ĉu Rotterdam estas la ĝusta urbo?

LIGE KUN LA DECIDOJ pri reorganizo de la laboro de la Centra Oficejo, leviĝis en la Estraro dum ĝia aprila kunsido ankaŭ demandoj pri la nuna fizika situo de la internacia centro de UEA. Dank' al la laboro de antaŭaj estraroj, UEA okupas bonan, dignan domon en grava strato centre de Rotterdam. La domo, kiu estas komplete posedata de la Asocio, enhavas sur siaj kvar etaĝoj taŭgan oficejan spacon, kunsidan ĉambron, pakejon, kuirejon, ktp. La libroservo okupas apartan ĉambron, la biblioteko plenigas (eĉ superplenigas) ĉambron kaj ĉambreton, kaj, sur la plej supra etaĝo, estas du loĝoĉambroj kaj fotografejo; entute, la domo havas 15 ĉambrojn de diversaj grandecoj. Pli perfektaj domoj ĉiam povus ekzisti; sed se oni prenas en konsideron la nunan laboron de UEA kaj ĝiajn limigitajn rimedojn, la domo en Rotterdam estas tre taŭga sidejo.

Sed UEA estas tre izolita en Rotterdam, kien ĝi translokiĝis en 1956. Kvankam vivoplena kaj grava havenurbo, Rotterdam ne estas registara aŭ instanca centro. Nia Asocio estas la sola grava internacia organizo kies sidejo troviĝas tie. Kvankam Rotterdam troviĝas nur iome for de la nederlanda politika centro, Hago, eĉ tiu urbo ne plu ludas la rolon kiel internacia centro, kiun ĝi iam ludis. Krome, Rotterdam mem ne estas aparte alloga urbo por eksterlandaj vizitantoj aŭ eventualaj oficistoj de la Asocio.

Kontraste, la najbara Belgujo kreskas kiel internacia centro kaj kiel fokuso de la Esperanto-agado. En Antverpeno nun evoluas preskaŭ dua centro de UEA, ĉar tie troviĝas la dua asocia kompostilo kaj tuta aro da volontuloj. Bruselo, la belga ĉefurbo, rapide fariĝas la ĉefa internacia urbo en okcidenta Eŭropo, dum centroj kiel Ĝenevo kaj Londono okupas malpli gravan lokon ol ili iam okupis. Pli ol cent internaciaj organizoj nun havas siajn sidejojn en Bruselo, kaj ilia nombro plue kreskas. Bruselo estas ĉefurbo de la Eŭropa Komunumaro kaj gastigas ankaŭ oficejojn de kelkaj aliaj interregistaraj instancoj. La urbo mem estas du-lingva, alloga, kosmopolita, vojkruĉa. Se en la estonteco UEA turnos sin pli intense al eksteraj organizoj kaj instancoj, Bruselo prezentas unikajn avantaĝojn kiel ĝia centro.

Konsciante, ke translokigo de la Centra Oficejo estus giganta tasko, kaj ke oni ne faru tian decidon sen tre zorga esploro de la konsekvencoj, kaj ankaŭ de la opinioj de la membroj, la Estraro tamen decidis serioze



La du roterdamaj ankrejoj de UEA: Supre – la malnova sidejo (1956-1961); sube – la nuna Centra Oficejo de UEA

esplori la terenon cele al eventuala translokiĝo al Belgujo. Tiu formala decido malfermas la tutan demandon por publika debato. Ni do volonte ricevos la opiniojn, sugestojn, atentigojn de niaj membroj. La Estraro intertempe elserĉos detalojn pri kostoj, impostaj cirkonstancoj, laborkondiĉoj ktp., por prezenti kiel eble plej klaran bildon de la avantaĝoj kaj malavantaĝoj.

Humphrey Tonkin

Nemalhaveblaj en la Komunumaro

Ĉi tiu teksto aperis en la franca ("30 Jours d'Europe") kaj nederlanda ("Europese Gemeenschap") eldonoj de la revuo de Eŭropa Ekonomia Komunumaro en septembro kaj novembro pasintjare. En tiuj du eldonoj — la revuo cetere aperas en ses diversaj lingvoj — estis samtempe publikigita ankaŭ alia prilingva teksto sub la titolo "Laabela turo de eŭropaj lingvoj". Ambaŭ tekstoj ricevis grandan atenton de la esperantistaro en la landoj de EEK kaj en la postaj numeroj de la franca kaj nederlanda revuoj aperis pluraj leteroj de legantoj, en kiuj oni atentigis pri Esperanto kiel ebla solvo de la eŭropa lingvo-problemo.

"INTERPRETISTO devas esti bona aktoro", tiel iu foje epitetis la ĉefan kvaliton de tiu viro aŭ virino kiu kapablas, en la ĉiutaga praktiko, ŝanĝi de unu lingvo al alia same rapide, kiel oni transvestas sin: la interpretisto.

Interpretistoj estas nemalhaveblaj en kompleksa tutaĵo kia estas la Komunumaro, kie preskaŭ ĉiu frontas lingvajn problemojn, kaŭzitajn de la komuna uzado de la lingvoj dana, germana, angla, franca, itala kaj nederlanda. El la iom malpli ol sep mil eŭropaj oficistoj, postenantaj en Bruselo, preskaŭ triono okupiĝas pri traduklaboro. Tie estas inkluzivitaj ne nur la interpretistoj sed ankaŭ tradukistoj kaj la servoj ŝargitaj reprodukti la laboron de tiuj homoj.

Evidente la interpretistoj rekte konfrontiĝas kun la eŭropa lingvo-problemaro. La diversaj servoj de EEK en Bruselo havas da ili 274 en permanenta servo. Krome, oni ofte devas peti helpon de honorariaj sendependuloj. Komparcele mi menciui, ke la servoj de Unuiĝintaj Nacioj en Nov-Jorko disponas pri 60 konstantaj interpretistoj, kiom havas ankaŭ tiuj en Ĝenevo. Por la ceteraj bezonoj, ĉie en la mondo oni apelacias al tre vasta arsenalo da laŭokazaj kunlaborantoj, el kiuj multaj migras kun la "konferenc-industrio" de loko al loko. En la plej gravaj eŭropaj ĉefurboj ekzistas speco de 'varbeblaj rezervoj', t.e. interpretistoj, kiuj prefere laboras memstare kaj neligite, kvankam, kun la forpaso de la tempo, ili plej ofte retrofluas en la samajn kanalojn kaj mediojn.

La granda diferenco en la nombro de interpretistoj inter UN, unuflanke, kaj EEK, aliflanke, havas plurajn kaŭzojn. Unualoke la kompleksa radaro de konferencoj, laborkunsidoj kaj kunvenoj de komisionoj atingas, ĉe EEK, meze 35 ĝis 40 kunvenojn ĉiutage. Kontraŭe, kvankam UN spertas kulminajn punktojn (ekz. la ĝenerala asembleo aŭ eksterordinaraj sesioj), inter ili estas longaj paŭzoj. Krome, ĉe UN oni aplikas multe pli la sistemon de dungado de ekstere. Alia problemo estas la nombro de lingvoj, allasitaj kiel laborlingvoj. Origine oni havis ĉe UN kvar laborlingvojn: la angla, franca, rusa kaj hispana. Poste aldoniĝis la ĉina kaj la araba. Lastatempe ankaŭ la germanoj ek-

postulas siajn rajtojn. Jam nun ilia lingvo estas uzata en kelkaj laborgrupoj. Tiuj, kiuj havas alian gepatran lingvon, devas en la ĉiutaga praktiko utiligi unu el la ĵus menciitaj lingvoj. Tio estas ja memkomprenebla se oni scias, ke en UN estas reprezentitaj pli ol 100 lingvoj. En Bruselo, la situacio aspektas alie. Kontraste kun NATO (kun dek kvin ŝtatoj-membroj kaj dek unu lingvoj), kie la franca kaj angla estas la oficialaj laborlingvoj, EEK restas seslingva, almenaŭ teorie. Strikte komprenite, oni do povas tie telefoni, korespondi kaj konferenci en ĉiu el la jam menciitaj ses lingvoj. Praktike, la realo estas tamen iom diferenca.

Frua florado

En la jaro 1952 la nederlanda lingvo estis unuafoje uzita oficiale je internacia nivelo. Tio estis okaze de la starigo de la Eŭropa Karbo- kaj Ŝtal-komunumo. Dum la preparlaboroj por la Traktato de Romo (la konstitucia akto de EEK kaj Eŭratomo) en 1956 kaj 1957, oni laboris kun teamo de interpretistoj. En 1958, kiam realiĝis la fondo de EEK, ĝia unua prezidanto, Walter Hallstein, havis je dispono grupon de 11 interpretistoj. Nuntempe, kiel jam dirite, 274 interpretistoj laboras en EEK. El ili 43 estas nederlandlingvaj, bele dividitaj duone-duone inter nederlandanoj kaj flandroj. Plue estas 86 interpretistoj por la franca budo, 48 por la germana, 44 por la brita, 44 por la itala kaj 9 por la dana interpretista budo. La interpretistaj lernejoj, kies tasko estas "produkti" tiujn specialistojn, ĉiam servis pli-malpli kiel gradmezurilo por la eŭropa lingvostoko. Tiel okazis, ke la nederlandlingvaj sekcioj de tiuj lernejoj en Ĝenevo, ĉe Sorbono en Parizo, kaj ankaŭ en Bruselo kaj Antverpeno travivis, en la sesdekaj jaroj, periodon de abunda florado. Estas strange, ke Nederlando mem ne havas lernejon por interpretistoj, se ne paroli pri malgranda kerno en la Universitato de Amsterdamo. Kiam, komence de la sepdekaj jaroj, evidentiĝis la disvastigo de EEK, multaj edukprogramoj transiris al la dana kaj norvega lingvoj, je la malprofito de la nederlanda. La anglalingvaj sekcioj evidente ne kaŭzis problemojn. Sed — kaprico de la sorto — Norvegio diris ne al la Komunumaro. Kaj kan-



Strasburgo: Nuntempe la naciaj flagoj pli multe simbolas la lingvan, ol ekonomian kaj politikan individuecojn.

didatoj por la dana lingvo estis malfacile troveblaj. La demando pri kandidatoj kun bona kono de la nederlanda daŭre kreskas ... ĝis la hodiaŭa tago.

Aktora talento

Tiu, kiu serĉas postenon ĉe unu el la eŭropaj servoj en Bruselo devas, apud sia gepatra lingvo, scipovi minimume unu el la aliaj lingvoj de la komunumaro. Por interpretistoj kaj tradukistoj la normoj estas, evidente, pli severaj. De ili oni postulas la (aktivan) konon de du aliaj lingvoj. Tio povas esti, kelkfoje, tre utila, ĉar povas okazi, ke ili devas "ensalti" kiam la disponebla nombro de interpretistoj riskas ne sufiĉi; tamen, plej ofte ili estas uzataj nur por traduki el la fremda en la gepatran lingvon.

Kiujn kvalitojn devas posedi bona interpretisto?

Staras je la pinto rapideco kaj inteligento. Ĉar oni ja atendas de interpretisto, ke li kapablu plenumi plurajn taskojn samtempe: aŭskulti, kompreni kaj senprokraste reprodukti. Kaj — mi jam diris tion — aktora talento

ankaŭ necesas. Efektive, ofte okazas, ke oni vidas la interpretiston gesti en sia budo, per la manoj kundiskutante. Bona interpretisto estu kapabla rajdi sur multaj ĉevaloj. Nur malmultaj el ili specialiĝis sur iu teknika tereno; ĉiu estas ia speco de ĉiofaranto, kvankam ordinarare ili havas la okazon informiĝi pri la tagorda temo — antaŭ la komenco de la sesio — tiel gravurante en la memoron iom da teknikaj terminoj. La servoj de EEK igas novicojn staĝi. Plej ofte oni dungas universitate edukitajn personojn, kiujn poste la servoj mem pretigas kiel interpretistojn. Tiu edukado prezentas multajn avantaĝojn, ĉar ĝi ja estas senpere adaptita al la propraj postuloj.

Tekniko de flustrado

Ekzistas kvar metodoj de interpretado. La unua estas la plej konata: la simultana interpretado, ĉe kiu la paroloj de la parolanto estas tuj transponataj laŭvorte en la alian lingvon. Dank'al la rapida evoluo de la teknologio, tiu ĉi metodo spertis mirige vastan disvolviĝon (ĝi estiĝis en la tempo de la Ligo de Nacioj, sed oni komencis vastskale apliki ĝin precipe post la Nurenberga proceso en la jaro 1946).

La bazo de la interpretista laboro tamen restas la tiel nomata "sinsekva metodo", ĉe kiu oni ripetas laŭparte iun paroladon. Sekvante tiun ĉi metodon, oni zorge priatentu forgesi nenion (eĉ ne detalojn) kaj reprodukti laŭeble perfekte la vortojn de la parolanto, imitante liajn stilon kaj intonacion. Aktortalento do vere konvenas ĉi-okaze al la interpretanto.

Malpli konataj kaj kutimaj estas la "flustra" kaj la "resuma" tradukteknikoj. Ĉi-lastata sistemo fakte egalas al "parola ĵurnalistiko". Kontraŭe, ĉe la "flustrotekniko" la interpretisto prenas lokon apud la persono, kiun li devas helpi, kaj al li flustras en la orelon la simultan-tradukon. Estas klare, ke tiun ĉi metodon eblas nur limigite utiligi.

La dana problemo

La EEK-lingvo, kaŭzanta la plej grandajn zorgojn, estas la dana. Ekzistas kialoj por tio: manko de tradicio, sekve manko de personaro, problemo, kiu ne estas solvebla per simpla turno de la mano. Kontraste kun la laŭgrada identiĝo de la ses "malnovaj" ŝtatoj-membroj, la tri novuloj tiel dire de unu tago al la sekvanta akiris plenan membrecon en EEK. Rilate la anglan lingvon, tio kreis neniun problemon, sed okazis male koncerne la danan. Je internacia nivelo la danoj kutime kontentiĝas per starigo de skandinava interpret-budo, interkonsente kun la norvegoj kaj svedoj. Tio signifas, ke ili sin turnas al interpretistoj regantaj unu el iliaj tri lingvoj ĉiufoje kiam temas pri traduko el alia lingvo. Tiu metodo funkcias tre glate pro tio ke la skandinavoj (kun escepto de la finnoj) perfekte interkompreniĝas dank'al la granda simileco de siaj lingvoj. Krome ili preskaŭ senescepte parolas, almenaŭ komprenas, la anglan lingvon. En Bruselo, tamen, tiu metodo ne aplikeblas. Aldoniĝas al ĉio ĉi, ke la dana havas la reputacion esti ne facila lingvo, tiel ke alilingvanoj mal-

oftege streĉas sin por lerni ĝin. Tiurilate favore sin distingas la nederlandanoj kaj la flandroj, sed malgraŭ tio ankoraŭ ne videblas je la horizonto baldaŭa solvo de la "dana problemo".

Egalrajteco?

Kiel dirite, la ses lingvoj de EEK oficiale estas egalrajtaj. Sed la praktiko estas alia. Tie la franca estas la konversacia lingvo. Ekde la momento kiam Britio aliĝis kiel membro, staras la demando: ĉu la angla lingvo eksuperregos? Ĉar unu afero estas tute klara: la lingva kaoso en la eŭropa Babela Turo povas nur plikompleksiĝi, precipe se iam aliĝos landoj kiel Greklando, Portugalio aŭ eĉ Turkio. Sed jam nun altrudiĝas iaj simpligoj. Ili tamen estas tuj brulstampataj kiel "politikaj" aferoj, ĉar se iu kuraĝas nur flustre diri, ke la franca aŭ la angla estos deklaritaj kiel oficialaj laborlingvoj, la tuta organizo ekribelas.

La francoj, kiuj komplete identiĝas kun la okcident-eŭropa situacio, utiligis prudente sed rezolute faktojn, por ili favorajn en Bruselo, Luksemburgo kaj Strasburgo pro historiaj, geopolitikaj kaj praktikaj motivoj. Kontraŭ la avancanta Albiono, kiu prezentas la solan kaj nuran minacon al la hegemonio de la franca lingvo

en EEK, jam prezidanto Pompidou sekurigis siajn sekvantojn en la momento de la aliĝo de la britoj, devigante la britan ĉefministron Heath promesi, ke ĉiuj oficistoj postenontaj en Bruselo scipovos almenaŭ esprimi sin franclingve.

Tiel estiĝis situacio, kiu, precipe por la interpretistoj, ne malofte aspektas iom senkuraĝiga. Nederlandanoj kaj danoj, sed ankaŭ germanoj kaj italoj ofte parolas, laŭlitere kaj metafore, kontraŭ la murojn (de siaj budoj). Neniu aŭskultas ilin, ĉar ĉiu en la konferencejo komprenas, sen tro da malfacilaĵoj, la francan aŭ la anglan tie parolatan. La originala versio ja estas ĉiam pli sekura, pli fidinda, ol kiu ajn traduko de la plej kompetenta interpretisto. Spite ĉion ĉi, tempeste levigis protestoj se iam oni decidus forigi la interpretistajn budojn.

Estas feliĉa cirkonstanco, ke la lingvo-problemo en la Komunumaro ne estas ekscese ŝarĝita de emocioj. Tamen, ĝi restas tikla afero, pri kiu oni prefere ne diskutas tro multe en la granda domo kun ĝiaj multnombraj leĝoj. Eĉ se nur pro tio ke oni ne volas vekti dormantan hundon.

Werner van de Walle
(El la nederlanda trad. E.L.M. Wensing)

EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO:

Kunlabora aranĝo

LA LANDAJ ASOCIOJ de Belgio, FR Germanio kaj Nederlando jam tradicie, en intervalo de kelkaj jaroj, organizas komunajn aranĝojn, kiuj portas la nomon de Eŭropaj Esperanto-Kongresoj. Efektive, temas pri kunligo de la jaraj ĉefaranĝoj de la tri landaj asocioj en unu internacian, pli imponan, pli prestiĝan manifestacion, kiu pli facile altiras ankaŭ publikan atenton. Ĉi-foje Eŭropa Esperanto-Kongreso okazis en la nederlanda urbo Eindhoven inter la 16a kaj 19a de aprilo. La Kongreso altiris preskaŭ 400 partoprenantojn el dudeko da landoj. En impona, tre taŭga kongresejo (apartenanta al la firmao Philips), kiu facile povus gastigi ankaŭ Universalan Kongreson, okazis pluraj laborkunsidoj — la tri landaj asocioj havis ankaŭ siajn jarkunvenojn tie — kaj tuta aro da distraj kaj kulturaj eventoj. La Kongreson partoprenis ankaŭ pluraj estraranoj de UEA, i.a. ankaŭ d-ro H. Tonkin, kiu festparolis kaj poste aparte prelegis pri la nuntempa agado de UEA. Tri apartajn laborkunsidojn gvidis d-ro W. Bormann (ekonomia aspekto de la lingva problemo), H. Behrmann (instruado de lingvoj) kaj H. Bakker (sekvoj de lingva superregado). La ekstera

eĥo de la Kongreso estis bona: aperis pluraj informoj kaj artikoloj en la gazetaro, d-ro Tonkin havis longan intervjuon kun internacia radio-stacio de Nederlando, oni letere alparolis ĉiujn deputitojn de la Eŭropa Parlamento en Strasburgo, ktp. La kongresan rezolucion vi trovas en sia tuteco ĉi-kune:

REZOLUCIO DE LA EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO:

La partoprenantoj al la Eŭropa Esperanto-Kongreso, okazanta en Eindhoven de la 16a–19a de aprilo 1976, venintaj el 19 landoj,

diskutinte pri a) "La sekvoj de la lingva superregado", b) "Ekonomiaj aspektoj de la lingva diverseco" kaj c) "La instruado de lingvo",

konstatas, ke la lingva superregado evidentiĝas en multaj sektoroj de la socia vivo, donante nejustan avantaĝon al certaj personoj super aliaj, ke la ekonomiaj sekvoj de la lingva diverseco finance troŝarĝas la plurŝtatajn instituciojn,

kaj ke la studado de pluraj naciaj lingvoj okupas la tempon, kiu devus esti uzata por la studado de fakoj esence pli gravaj,

rekomendas konsekvence, por konservi la homan identecon, por malfermi mondvastan kulturan perspektivon kaj por liberigi financajn rimedojn por pli gravaj taskoj, krom la instruado de la gepatra lingvo por la internaj rilatoj, la instruadon kaj uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto por internacia komunikado.

Eindhoven, la 18an de aprilo 1976

Enketo pri la revuo

KIAM ONI CELAS produktadi revuon, kiu plaĉos al la legantoj, necesas de tempo al tempo ankaŭ konsulti tiujn legantojn alparolante ilin rekte per enketfolio. Ĝuste tion ni faras nun, kun peto, ke vi unue almenaŭ supraĵe tralegu la tutan enketilon kaj nur poste bonvole respondu al ĝiaj unuopaj demandoj. Al la demandoj antaŭ kiuj staras kvadratetoj ☐ bonvolu respondi farante signon en tiuj kvadratetoj, ĉar vi tiamaniere plifaciligos la postan prilaboron de la enketiloj. Kompreneble, ke vi ne devas indiki vian nomon, se vi volas resti anonima; pleje gravas, ke vi ja resendu la enketilon.

PERSONAJ DEMANDOJ

1. S-ro, S-ino, F-ino (nomo)
Profesio: Aĝo:
Adreso:
.

ĜENERALAJ DEMANDOJ

Pri via legado de la revuo —

2. Ĉu vi kutime legas, de difinita numero,
☐ (a) la tuton?
☐ (b) grandan parton?
☐ (c) nur partetojn?
3. Ĉu vi kutime legas la revuon
☐ (a) tuj post ricevo?
☐ (b) en unu semajno post ricevo?
☐ (c) en unu monato post ricevo?
☐ (ĉ) en pli ol unu monato post ricevo?
4. Post legado, ĉu vi
☐ (a) konservas la revuon?
☐ (b) forĵetas ĝin?
☐ (c) transdonas ĝin al alia esperantisto?
☐ (ĉ) donacas ĝin al klubo aŭ grupo?
☐ (d) donacas ĝin al neesperantista biblioteko?
☐ (e) uzas ĝin en la informado?
5. Ĉu via ekzemplero de la revuo estas legata
☐ (a) nur de vi?
☐ (b) de 2 personoj?
☐ (c) de 3 ĝis 5 personoj?
☐ (ĉ) de pli ol 5 personoj?

DEMANDOJ PRI AMPLEKSO KAJ ASPEKTO DE LA REVUO

6. Ĉu ĝenerale la grafika aspekto de la revuo
- ☐ (a) plaĉas al vi?
 - ☐ (b) ne plaĉas al vi?
- Se vi respondis per (b), bonvolu indiki, kial ĝi ne plaĉas:
-
-
7. Ĉu la grado de ilustriteco (fotoj, desegnaĵoj ktp) estas laŭ via opinio
- ☐ (a) sufiĉa?
 - ☐ (b) nesufiĉa?
8. Ĉu vi pretus pagi pli altan abonprezon (ekzemple 30% pli) por 30% pli da paĝoj (ni diru por 32 paĝoj)?
- ☐ (a) jes
 - ☐ (b) ne

DEMANDOJ PRI ENHAVO DE LA REVUO

9. Kiuj estas, laŭ vi, la ĉefaj celoj de la revuo "Esperanto"?
- ☐ (a) informilo pri novaĵoj en la Esperanto-movado?
 - ☐ (b) ligilo por aktivuloj en la movado?
 - ☐ (c) revuo de ĝenerala intereso?
 - ☐ (ĉ) edukilo por aktivuloj en la movado?
 - ☐ (d) plibonigilo de la lingva nivelo?
 - ☐ (e) kultura revuo?
10. En la revuo regule aperas informoj kaj artikoloj pri la Esperanto-movado ĝenerale, pri UEA, TEJO, Universalaj kaj Landaj Kongresoj, konferencoj, fakaj agadoj, Esperanto-literaturo, kulturo, novaj libroj, vortaroj kaj instruiloj, internaciaj organizaĵoj kiel UN kaj Unesko, esperantlingvaj radio- kaj televido-dissendoj, edukado, lingvistiko, la rubriko "Loke-Fake-Persone", la rubriko "Leterkesto", anoncoj, kalendaro pri Esperanto-aranĝoj ktp. Bonvolu skribi ĉi-sube minimume kvin temojn (rubrikojn) — ĉi-supre resumitajn — laŭ la sinsekvo de viaj personaj preferoj:
- 1
- 2
- 3
- 4
- 5
11. Kiu(j)n temo(j)n, laŭ via opinio, la redakcio ne sufiĉe — aŭ tute ne — prikonsideras?
-
-
-

12. Se vi konas persono(j)n, kiu(j) pretas kaj kapablas verki interesajn artikolojn pri la de vi preferataj temoj, kiuj ili estas?

.....
.....

13. Ĉu vi regule renkontas, en la revuo, artikolojn pri temoj, kiuj tute ne interesas vin?

☐ (a) jes

☐ (b) ne

Se jes, bonvolu mencii mallonge tiujn temojn:

.....
.....

14. Kies artikolojn vi prefere legas? (Nomu la nomojn, se eble, de la koncernaj aŭtoroj):

.....
.....
.....

15. Ĉu vi trovas, ke ĝenerale la enhavo de la revuo respegulas la neŭtralecon de UEA, kiel ĝi estas priskribita en la statuto de la Asocio ("neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj")?

☐ (a) jes

☐ (b) ne

Se vi respondis per (b), bonvolu doni ekzemplojn:

.....
.....

16. Kiu(j)n nova(j)n rubriko(j)n vi volonte vidus regule aperadi en la revuo?

.....
.....

17. Kiu(j) ĝisnuna(j) rubriko(j) povus, viaopinie, forfali el la enhavo de la revuo?

.....
.....

18. Ĉu vi havas aliajn specifajn dezirojn rilate la enhavon de la revuo, ne menciitajn jam supre?

.....
.....

19. Ĉu vi ŝatus pli oftan kaj pli ampleksan rubrikon "Leterkesto" ?

☐ (a) jes

☐ (b) ne

DEMANDOJ PRI LA LINGVONIVELO DE LA REVUO

20. Ĉu vi trovas la vortprovizon uzatan en la revuo

☐ (a) sufiĉe ampleksa?

☐ (b) tro ampleksa?

21. Ĉu vi trovas la stilon kaj frazkonstruon

- ☐ (a) bonaj?
- ☐ (b) adekvataj?
- ☐ (c) tro malfacilaj?

22. Ĉu vi havas (aliajn) plendojn pri la lingvaĵo de la revuo?

.....

.....

.....

DEMANDOJ PRI LA RITMO DE APERO DE LA REVUO

23. Ĉu vi konsideras la jaran nombron de numeroj de la revuo (11 numeroj jare) nepre konservenda aŭ vi akceptus redukton ĝis, ekzemple, 9 numeroj jare?

- ☐ (a) nepre konservenda
- ☐ (b) akceptus redukton

24. Lastatempe la revuo ne povis aperi ĝustatempe pro bedaŭrinda manko de laborfortoj en la Centra Oficejo. Ĉu vi konsideras tiajn malfruiĝojn

- ☐ (a) tre ĝenaj?
- ☐ (b) iom ĝenaj?
- ☐ (c) apenaŭ ĝenaj?
- ☐ (ĉ) ne ĝenaj?

DEMANDOJ NUR AL EKSTEREŬROPAJ ABONANTOJ

25. Ĉu vi ricevas la revuon marpoŝte aŭ aerpoŝte?

- ☐ (a) marpoŝte
- ☐ (b) aerpoŝte

26. Se vi ricevas ĝin marpoŝte, ĉu la malfrua liverado estas por vi granda ĝeno rilate al via informiteco?

- ☐ (a) jes
- ☐ (b) ne

27. Ĉu vi estus preta pagi kroman sumon por ricevi la revuon aerpoŝte? (Por la koncernaj krom-pagoj, vidu la tarifojn sur la dua kovrila paĝo de la revuo)

- ☐ (a) jes
- ☐ (b) ne

La Estraro de UEA dankas anticipe pro via laŭeble kompleta kaj serioza respondado al la demandoj en ĉi tiu enketilo kaj petas vin bonvoli resendi ĝin antaŭ la fino de septembro 1976 al la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

Eŭropaj kutimoj kaj la tutmondigo de Esperanto

NE ESTIS EBLE atendi de L.L. Zamenhof, kiu vivis en la eŭropa parto de la terglobo, ke Esperanto havu plene universalan karakteron super ĉiuj nacioj. Tial enkondukiĝis jam de lia epoko — sen paroli pri vortradikoj — diversaj eŭropaj kutimoj en la uzon de Esperanto, pri kio nuntempaj eŭropaj esperantistoj ĝenerale ne konscias, kvankam ili havas pli da ŝancoj konatiĝi kun la kulturoj kaj kutimoj de aliaj mondopartoj, ol Zamenhof havis.

Antaŭ ol pli detale ekstrakti la temon, ni momente rigardu la konsiston de la homaro. Laŭ la jarlibro de Unuiĝintaj Nacioj, la nunan homaron konsistigas 56,7% loĝantoj de Azio, 12,6% eŭropanoj, 9,5% afrikanoj, 8,8% loĝantoj de Nord-Ameriko, 6,6% loĝantoj de Soveta Unio, 5,3% sud-amerikanoj kaj 0,5% loĝantoj de Oceanio.

Kiam ni ĉi tie parolas pri "eŭropaj" kutimoj, ni fakte povas kune enkalkuli en tiun "Eŭropo"-n ankaŭ grandajn partojn de Norda kaj Suda Amerikoj, de Soveta Unio, Oceanio kaj eĉ parteton de Afriko. Tamen, restas nerenversebla la fakto, ke iom pli ol duono de la tuta homaro estas la aziaj popoloj, kies granda parto havas neniajn ligojn kun la t.n. "eŭropaj" kutimoj.

Nu, kiaj eŭropaj kutimoj estas ĝis nun enkondukitaj en la uzadon de Esperanto? Jen ekzemploj arbitre prenitaj.

Pri "sinjorino" kaj "fraŭlino"

En la ĵus pasinta Jaro de la Virino oni ne multe parolis pri la diskriminacia kutimo de la seksaj titoloj en la Internacia Lingvo, ĉar verŝajne, por granda parto de la aktivaj eŭropaj esperantistoj, tiel senkonscie diskriminacii estas la kutimo en iliaj naciaj lingvoj. Ili eĉ ne scias, ke ekzistas landoj, kie oni ne distingas alparole sinjorinon de fraŭlino, nek fraŭlon de sinjoro, nek inon de mal-ino. Ekzemple en Japanujo, kie estas simpla titolo *san* por ĉiuj homoj, lernantoj de Esperanto devas lerni la eŭropan kutimon distingi la homojn per "sinjoro", "sinjorino" kaj "fraŭlino", krom lerni la lingvon mem. Por la popoloj, kiuj ne kutimas distingi viron kaj virinon per tiaj titoloj, kiaj sinjoro kaj sinjorino, estas plia ŝarĝo atenti ankoraŭ tion, ĉu ŝi edziniĝis aŭ ne. Al la ofta demando de kursanoj "Kial ne fraŭlo?", la kursgvidanto hezite respondas: "**Oni kutimas** distingi la edzinecon de la virino sed ne la viran edzecon; ankaŭ laŭ Zamenhofaj verkoj" aŭ "Estas eŭropa kutimo, kiu radikiĝis en Esperanto, kiun ankaŭ ni devas imiti".

Kompreneble, konsciaj kursanoj ne kontentiĝas per tiaspeca respondo.

Respektaj titoloj

Lastatempe, ĉu pro ia tajdo, oni komencis diskuti pri la distingaj aŭ respektigaj titoloj (*Esperanto*, 1975, p.130 kaj 190). Ankaŭ rilate al tio, estas necese diri, ke ekzistas nacioj, kiuj ne uzas distingajn titolojn, escepte de la kazoj, en kiuj la titoloj havas veran signifon kaj rolon.

Sed en la ĝenerala uzo, la Esperanto-gazetaro kaj esperantistoj sekvas la kutimon de kelko da eŭropaj landoj. Nuntempe estas tiel, ke esperantistoj en aliaj landoj, kie oni ne kutimas distingi homojn per titoloj, ne kuraĝas agi laŭ sia maniero por ne ofendi homojn, kiuj kutimas esti tiel distingataj, kaj finfine simple imitas ilian kutimon. Tiel uzataj estas difinitaj titoloj, kiel doktoro, profesoro, inĝeniero, super la aliaj profesioj kaj scioj. Aparta demando rilate al la respektaj titoloj estas laŭvorta kopiado de eŭropa lingvo-kutimo, aldoni triapersonan posedan pronomon al altranga titolo, kiel — ekzemple — "Ŝia moŝto, la reĝino Juliana", "Lia ekscelenco la ambasadoro" (*Esperanto*, 1974, p.122). Ĉiuj lernantoj de Esperanto en landoj, kie oni ne kutimas fari tion, devas lerni ankaŭ tiun eŭropan kutimon kune kun la lingvo, kiu pretendas esti neŭtrala kaj internacia.

Neologismoj — nur se vere necesaj

Kiam eŭropanoj ne trovas ĝustan Esperantan vorton por esprimi ion, ili kutimas esperantigi ekvivalentan vorton el sia propra lingvo aŭ el aliaj eŭropaj lingvoj. Kiam azianoj ne trovas ĝustan vorton, ili tamen penas iel esprimi per alia vorto aŭ per kombino de pluraj vortoj jam ekzistantaj kaj ĝenerale ne kuraĝas esperantigi la koncernan vorton el sia propra nacia lingvo. Se eŭropanoj rajtas arbitre produkti neologismojn kiel "dirigento" (= taktilisto) kaj "domini" (= regi), kiuj ne troviĝas eĉ en *Plena ilustrita vortaro* kaj kiujn oni ne komprenas, ne konante la lingvojn, de kiuj ili venis, ĉu ekzemple aziaj kaj arabaj popoloj rajtas fari same el siaj propraj lingvoj? Onia argumento, ke tiuj vortoj estas internaciaj, tute ne validas por homoj, kiuj ne scias la koncernajn fremdajn lingvojn, — homoj, kiuj estas plimulto de la tuta homaro.

Por ne pli grandigi la jam tre grandan kvanton da vortoj, kiujn devas lerni tiuj homoj, kies lingvoj estas tute ne parencaj al iu ajn eŭropa lingvo, oni estu tre

atentaj por alpreni novan vorton. Tiurilata leĝeranim-eco estas tre danĝera sur la vojo al la tutmondigo de Esperanto. Necesas noti, ke ĉi tie ne temas pri neologismoj vere necesaj, el kiuj unu estas "jutoro" por la japanaj, kiuj ne trovas ekvivalentan vorton en la Esperanto-vortaro nek ĝian koncepton en Eŭropo (tamen ekzistantan inter la ĉinoj). Ĝi ja estas por ili vivnecesa vorto, preskaŭ ĉiutage uzata, por esprimi vivkoncepton.

Kalendaro

Unu el la aferoj, kiujn eŭropanoj ĝenerale ne tre konscias, estas, ke ilia jaro, iliaj nomoj de la monatoj kaj tagoj kaj la dat-sistemo ne estas tutmondaj.

La nuna islama kalendaro havas pli junan jaron, ol la kristana jaro 1976. La japana nuna jaro estas nur 51-a, do du-cifera. Ankaŭ aliaj aziaj landoj, kiel Indonezio, havas malsamajn jarojn.

La nomoj de la monatoj devenintaj de la romiaj regintoj, kiel Julius kaj Augustus, estas tute ne uzataj en Azio. Ekzemple en Ĉinio, Indonezio, Japanujo kaj Koreo la monatoj estas nomataj simple: 1a monato, 2a monato ... 12a monato, pli logike ol septembro (ne sepa, sed 9a monato), oktobro (ne oka, sed 10a monato), decembro (ne deka, sed 12a monato).

La nomoj de la ĉina semajno estas nur la 1a ĝis 7a "stelperiodoj" (= semajn-seponoj); tute ne parencaj al Luno (lundo), Marso (mardo), Merkuro (merkredo)...

La datsistemo en Azio ĝenerale estas, samkiel ekz-e en Hungarujo, jaro/monato/tago, diference de la ĝenerale eŭropaj sistemoj: tago/monato/jaro aŭ monato/tago/jaro. Mi ne scias, ĉu ekzistas popoloj, kiuj uzas la sistemon jaro/tago/monato. (La Internacia Organizaĵo por Normigo antaŭ kelko da jaroj alprenis la sistemon jaro/monato/tago, kiel internacie rekomendindan.)

Kaj plue

"Forta" kafo en Eŭropo estas "densa" kafo en Japanujo. "Varma" manĝo kun terpomoj en pluraj eŭropaj landoj ne havas la saman signifon kiel en Azio, kie la terpomoj havas ne altan pozicion inter la manĝaĵoj. "Antaŭnomo" en Ĉinio, Hungarujo, Japanujo, Koreo, Vjetnamo k.a. estas familia nomo, ĉar ĝi antaŭas la individuan nomon.

La monda organizaĵo UN estas en la menso de la parolantoj de eŭropaj lingvoj plurala kiel Unuiĝintaj Nacioj, sed — ekzemple — por la ĉinoj, japanoj kaj koreanoj UN estas Unuiĝinta Naciaro, ĉar ĝi estas entute unu organizaĵo. Esperanto feliĉe havas sufikson *-ar-* por tia celo. Kial ne uzi ĝin?

Ofte levigas la demando pri la eŭropa karaktero de Esperanto el la terminologia vidpunkto. Sed la sama demando el alia vidpunkto, kiel ĉi tie prezentita, ne estas ofte levita.

La psika subpremiteco de esperantistoj, kies lingvoj ne estas parencaj al iu ajn eŭropa lingvo, estas ne-neglekteble granda, kion pravas ankaŭ la jena frazo aperinta en la organo de Japana Esperanto-Instituto (*La Revuo Orienta*, 1973, n-ro 12, p.15): "...eŭropanoj ŝajne libere kaj flue uzas Esperanton laŭ siaj kutimoj, dum japanoj sekvas ilin fidele kaj obeeme, aŭ blinde kaj timeme."

Por ke la popoloj, kiuj ne konas la menciitajn eŭropajn kutimojn, povu facile lerni la Internacian Lingvon sen sperti samtempan trudon de tiuj fremdaj kutimoj, ni lasu por ili pli da liberaj lokoj ankaŭ en diversaj konkursoj kaj ekzamenoj. Ni evitu, ke instrui la Internacian Lingvon en kursoj ekster Eŭropo signifu instrui samtempe eŭropajn kutimojn.

Akiko Woessink-Nagata

Leterkesto

Respondi kaj respondi

Respondi signifas: doni replikon je demando aŭ aserto. Tio estas tute klara fakto.

Pro ne plu kompreneblaj kialoj la vorto respondi estas uzata ankaŭ en la senco de respondi. Respondi signifas laŭ *PIV*: antaŭ-devigi sin porti la sekvojn de propra aŭ aliula ago. Tio estas tute alia afero ol respondi.

B. Vogelmann, FR Germanio

Ĉu perleto por infanoj?

Pro la tre entuziasma recenzo en *Esperanto* (februaro 1976, p.28), mi mendis por mia 6-jara nepino la libreton *Kiu ne estas en la lito?* de K. Sena. Je mia konsterniĝo, mi notis, ke temas pri tute ne-ĉarma fantomo.

T.G. Kokkedee-Montanus, Nederl.

Szerdahelyi malpravas

Mi esprimus alimaniere la plendojn de d-ro Szerdahelyi (aprila numero). UEA, kaj sub la nuna gvidantaro kaj sub la antaŭaj, ĉiam celis servi kiel ponto inter la "organizita movado" kaj la agado en la "establita mondo". Rompo de la rilatoj inter tiuj ekstremaĵoj dividas la vivantan kulturon for de la lingva esplorado kaj la informado — kun negativaj rezultoj ambaŭflanke. Tion bone komprenas ankaŭ la gvidantoj de la Akademio. Se prof. Waringhien deziras, ke la akademianoj estu "bonaj esperantistoj" (t.e. bonaj parolantoj kaj uzantoj de la lingvo), li nur konstatas, ke akademiano kiu ne bone komprenas la Esperantan kulturan tradicion ne povas bone kompreni la fenomenon Esperanto. Esperanto, finfine, estas vivanta lingvo. Ke akademianoj estu ankaŭ bonaj lingvistoj, ŝajnas al mi memkompreneble — kvankam la ligo inter universitata instruiteco kaj detala kono de lingvistiko estas nur probabla, ne nepara. La kritikoj de d-ro Szerdahelyi estas utilaj, sed ĉi-foje li malpravas.


Humphrey Tonkin, Britio

AL LA AMIKOJ DE KER:

Helpo bezonata!

LA KOMISIONO por Eksteraj Rilatoj de TEJO laboras, jam depost 1964, por krei prestiĝan pozicion por TEJO en la ne-esperantista junulara mondo, por konvinki ĝin pri la maljusto de kultura kaj lingva superregado, kaj por atentigi ĝin pri la justa, ĉar neŭtrala, solvo pere de la Internacia Lingvo. Tiuj tri terenoj cetere proksime interrilatas.

Konstati ke la ideo de Esperanto pri lingva egalrajteco, kiel ĝin unuafoje konceptis Zamenhof, estas kontraŭa al la kutimaj pens- kaj kondut-manieroj en nia socio, aŭ per "modernaj" vortoj: konstati ke Esperanto estas "alternativo" por tiuj kutimaj pens- kaj kondut-manieroj en nia socio, estas politika elpaŝo. Ekde la kongreso de Tyresö en 1969, KER bazigas sian agadon sur tiu ideo, kaj per tio alianciĝis al la aliaj idealismaj jun-



ularaj movadoj kiuj volis anstataŭigi la kutiman politikon de hegemonio kaj konkurenco per alternativa politiko: de justo kaj egalrajteco. Ke tio ankaŭ validas por lingvoj, estis la specifa kontribuo de KER en tio. Ne estas loko ĉi tie por listigi ĉiujn seminariojn, bultenojn, vizitojn, vojaĝojn, eldonaĵojn, reprezentantojn; nek la milojn da leteroj, la centojn da sukcesetoj, la dekojn da realaj atingoj dum tiuj jaroj. Sufiĉu ke KER — ĝiaj unupersona sekretariato, dekpersona komisiono, centpersona kunlaborantaro — laboregis konstante kaj aktive, kaj eĉ iugrade efike. Nun TEJO estas konata organizaĵo kaj ĝia mesaĝo diskoniĝas en multaj junularaj rondoj ne-esperantistaj, kaj eĉ en iuj esperantistaj...

Cetere, rezulto de la KER-agado ne estas kalkulebla en nombroj de Esperanto-lernantoj, sed en la komprenemo

pri la kialoj kaj pravoj de Esperanto. Ekstreme dirite: ne-esperantista "samideano" estas por KER pli bona rezulto, ol perfekta Esperanto-parolanto sen socia konscio.

KER ne estas tre konata, tamen, inter esperantistoj, ĉar ĝia tereno estis nature ekster la Esperanto-movado. Ĝi ankaŭ ne postulis la financajn rimedojn de TEJO, nek de UEA, nek de individuaj esperantistoj. Ĝi sukcesis dum longa tempo trovi tion ekster la Esperanto-movado, en subvencioj kaj vendado.

Tio tamen nun ŝanĝiĝis. Malgraŭ konstantaj streĉoj, la financa situacio necesigas nun tujan alvokon al "la propra popolo", la esperantistoj. Se vi volas, ke la sekretariato de KER (nun en Hago) povu daŭrigi sian laboron, vi helpu nun. Ni bezonas 10 000 gld. jare, kiel konstantan bazon. La ceterajn rimedojn KER povos mem trovi. Insiste ni petas al vi sendi vian promeson subteni KER ĉiujare per ekz. 50, 100, 500 aŭ 1000 gld., se vi povas, ĉar alie bankroto minacas. Jam reagis al unua alvoko en Nederlando dekkvino da simpatiantoj, sed ni bezonas pli. Sendu tian promeson per letere aŭ poŝtkarte al KER, Riouwstraat 172, Den Haag, kaj vi ricevos pliajn informojn pri pagmaniero, impostaj avantaĝoj (por Nederlandanoj), kaj kelkajn KER-eldonaĵojn. Vi ankaŭ povas tuj pagi al: poŝtgirkonto 1497537 nome de Stichting Taalproblemen, Kastenstraat 231, Amsterdam 1011.

Estus domaĝo se tiom da sindono, tiom da entuziasmo kaj efika laborado investita dum 12 jaroj, nun perdiĝus, nur pro monmanko.

Hans Bakker

REGIONA AGADO DE TEJO:

Kuraĝigi izolulojn

KOMENCE de ĉi tiu jaro aperis 30-paĝa raporto pri la Regiona Agado de TEJO. Tiu agado direktiĝas al la landoj kie TEJO ne havas landan sektion kaj provas kuraĝigi tie loĝantajn individuajn esperantistojn labori pli efike (v. ankaŭ nian revuon, majo 1975, p.94). La unuaj paĝoj de la raporto prezentas la ĉeflaborantojn: du TEJO-estraranoj kaj sep regionaj komisionanoj, kaj skizas iliajn celojn kaj agadsistemojn. Post tio, aperas regiona divido de la mondo, kaj por unu el tiuj regionoj — Afriko — aperas laŭlanda historia skizo de la ĝisnuna Esperanto-agado, kune kun kontaktadreso kaj klariga mapo. Similaj raportoj estas preparataj por aliaj mondregionoj. La lasta parto de la raporto sumigas laŭlande, interne de la regiona disdivido, la laboron faritan lastatempe. Evidentiĝas, ke estas faritaj pli ol cent klopodoj kontakti izolulojn proponante al ili kunlaboron en la disvastigo de Esperanto. En fina komento, la raporto konsilas, ke momente pli gravas apogi la instruadon de la Internacia Lingvo en la pli izolitaj landoj, ol celi tuj al starigo de landa sekcio de TEJO.

Kun radikala tendenco

Recenzas Peter G. Forster (Britio):

Historieto de la japana Esperanto-movado, de M. Masao. Oosaka: KLEG, 1975 (dua eldono), 116p. 19cm.

Kvankam Esperanto celas esti tutmonda lingvo, efektive la ĉefaj eventoj en la historio de la internacie organizita Movado ĝis nun okazis en Eŭropo. Pro tio la historiisto de Esperanto emas forgesi gravajn ekster-eŭropajn landajn movadojn, kiel ekzemple la japanan. Ĉi tiu "historieto", reeldonaĵo de antaŭa "historio", prezentas utilajn informojn pri relative nepritraktita, tamen grava, parto de la historio de Esperanto. La aŭtoro skizas la fruan historion de Esperanto en Japanio — en kiu fremduloj havis grandan rolon — kaj la postan disvolviĝon de la organizita movado. Li emfazas precipe la rilaton inter Esperanto kaj diversaj radik-alaj tendencoj, kvankam li indikas ke estas ankaŭ aliaj tendencoj en la japana movado. Li pritraktas ankaŭ la persekutojn kontraŭ japanaj esperantistoj; la post-militajn malfacilaĵojn; la gravecon por japana esperantista vivado de la Universala Kongreso en Tokio; kaj nuntempajn malfacilaĵojn.

La verko havas klaran radikalan tendencon kaj la diversaj eventoj en la historio de Esperanto en Japanio estas pritraktataj laŭ tiu starpunkto. El lingva vidpunkto, necesas atentigi pri diversaj stilaj neklar-aĵoj, kaj misortografiaĵoj en kelkaj okcidentaj nomoj, kiuj devis esti korektitaj en la dua eldono. Sed ĝenerale ĉi tiu verko estas utila kontribuado al la historio de Esperanto.

Prezo: 8,16 (por Nederlando 8,49) gld. plus sendokostoj 10%.

Modelo kluba

Recenzas Akiko Woessink-Nagata (Nederlando):

Media malboniĝo en la mondo kaj rimedoj de civitanoj, de Esperanto-Societo Meguro (Japanio). Eldonis la aŭtoroj, 1975. 52p. 26cm. Dulingva eldono.

Altvalora estas la esenca enhavo de la eldonaĵo pri unu el la plej tipaj problemoj de la moderna socio. La traktaĵo estas imitinda modelo de konkreta kolektiva laboro de loka klubo.

Dum la japanlingva raporto (farita de membro de la Esperanto-Societo Meguro) estas senripoĉa, en la Esperanta raporto (traduko el la japana) plurloke sentebaj estas la penoj de la tradukintoj, kiuj tamen ne sukcesis plene respeguligi la lingve altnivelan originalon. Troviĝas tie ne-ĝustasence uzitaj vortoj, netransitivaj uzoj de transitivaj verboj kaj inverse, mistraduko de "metal-industrio" per "min-industrio", uzo de japana vorto *hedoro* sen klarigo, kaj aliaj lingvaj eraretoj. Krome, kelko da frazoj enigme cerbumigos la legantojn.

Malgraŭ la ne tre glata traduko, la Esperanto-Societo Meguro donis bonan ekzemplon de utiligo de Esperanto en internaciskala esplorado, kiun alte taksas ankaŭ japanaj ĵurnaloj. Gravus la signifo de la raporto, ege leginda, tiel por interesigantoj pri la traktata temo, kiel por lokaj grupoj, kiuj kutimas tro multe inklini al belartaj verkoj.

Prezo: 4,20 (por Nederlando 4,37) gld. plus sendokostoj 10 procentoj.

Kial ne nova traduko?

Recenzas Baldur Ragnarsson (Islando):

Hasanagaino / Hasanaginica, popola balado. Trad. el la serbokroata Fran Janjić. Sarajevo: Elbih, 1975. 44p. Ilus. 17cm.

Laŭ redakta noto la celo de la eldono de tiu ĉi libreto estas "kontribui al prifesto de la 200-a datreveno de post la unua publikigo de tiu ĉi fama poemo kun internacia historio". Fama ja, ĉar nur en la germana lingvo ekzistas de ĝi proks. 50 tradukoj kaj 20 en la angla kaj la franca, laŭ antaŭparola informo. Fine de la libro evidentiĝas, ke ja temas pri la kvara eldono en Esperanto de la balado, kaj efektive represo de traduko, eldonita en 1925.

El la 44-paĝa libro nur 6 paĝojn okupas la balado mem en dulingva eldono. La temo estas iom banala: edza suspekto, forpelo de edzino senkulpa, ŝia morto pro ĉagreno. Estas ja kompreneble, ke tia temo povis kapti la romantikan imagemon de la antaŭa jarcento, sed ĝia nuna kaptopovo apenaŭ samefikas. Precipe, kiam la traduko estas parte obskura, parte kritikinda ritme kaj esprime. Estas malfacile kompreni, kial oni ne uzis la celebran okazon por fari novan pli artan tradukon de la nur 92-versa balado. La literaturhistoria eseo, "Patrujo de Hasanagaino", en traduko de Karolo Pić konsistigas la ĉefan parton de la libreto, kaj certe estas necesa por plena kompreno de la poemo, kiu devenas el muzulmana medio kaj bezonas detalajn klarigojn.

Prezo: 4,80 (por Nederlando 4,99) gld. plus sendokostoj 10%.

Laste aperis . . .

Basisgegevens over de Internationale Taal (Esperanto), I. Lapenna (1909-). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1976. 16p. 21cm. Nederlandlingva traduko de la konata CED-dokumento *Bazaj faktoj pri Esperanto*. Prezo: 0,90 gld.

Bhagavad-Gita; Sublima kanto pri la senmorteco. Trad. el sanskrito (1941) F.V. Lorenz. Rio: Federação Espírita Brasileira, 1975 (2a eldono), 96p. 19cm. 9,30 gld.

Dongting-a Popola Komunumo (1973), Vu Ĝoŭ. Pekino: Fremd-lingva Eldonejo, 1975. 60p. Ilus. kun mapo. 18cm. 1,20 gld.

EŝLI-Jarlibro 1975. Danlando: Esperanta Ŝak-Ligo Internacia, 1975. 38p. Mimeo. 30cm. Entenas ankaŭ terminaron. 3,90 gld.

Insigno n-ro 23, ronda, diam. 23mm, interna cirklo kun la verda stelo kaj la vorto "Esperanto" ĉirkaŭe. Prezo: 2,10 gld.

Insigno n-ro 25, diam. 10mm, verda stelo sur blanka fono, kun kluĉilo (tre sekura kontraŭ perdo). Prezo: 1,50 gld.

Globkrajono lignokolora, kun ora surpriso de la vorto "Esperanto". Fortika, moderna kaj tre eleganta skribilo kun longdaŭra ŝanĝebla inkkartoĉo. Prezo: 3,— gld.

Kanalo Ruĝa Flago, Lin Min. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1976. 60p. Ilus. kun mapoj. 18cm. 1,20 gld.

Kvindek argentiaj tangoj, E. de Bonaero kaj Horacio Ré. Diamante (E. Rios): Argentina Esperanto-Muzikeldonejo, 1975. 58p. 16cm. Kanzonaro kun muziknotoj en aparta suplemento (93-paĝa). Senpage distribuata de la eldonejo.

Lanti, Vivo de, E. Borsboom. Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1976. 271p. Ilus. 19cm. Biografia studo pri la fondinto de SAT, kun 70-paĝa aŭtobiografia teksto "Fredo" de Lanti mem, persona indekso kaj pluraj listoj kaj tabeloj. Prezo: 30,60 gld.

KONGRESLIBRO AĈETEBLA

Eĉ se vi ne ĉeestos la 61an UK en Ateno, vi povos aĉeti la Kongresan Libron. Kiel kutime, ĝi enhavos detalan programon, informojn kaj artikolojn pri la kongresa lando kaj adresaron de ĉiuj kongresanoj.

Ĉar la eldonkvanto estas limigita, necesas mendi sian ekzempleron antaŭ la 15a de junio ĉe la Libroservo de UEA. La Kongresa Libro kostos 10,— guldenojn.


Malgrandaj plantidgardantoj, Gu Juzeng k.a. Pekino: Fremd-lingva Eldonejo, 1974. 24p. Kolorilus. 20cm. 1,20 gld.

Norman Bethune en Ĉinio, Ĝong Ĝiĉeng. Pekino: Fremdlingva Eldonejo, 1975. 120p. Ilus. 17cm. Bildrakonto pri kanada kuracisto en Ĉinio. 1,20 gld.

RD Vjetnamio. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1975. 200p. Ilus. kun mapoj. 21cm. Historia kaj geografia skizo pri Vjetnamio. 3,60 gld.

Une Langue Internationale commune à toutes les Nations du Monde, Gabriel Rougetet. Paris: UFE, 1976. 40p. 23cm. Franc-lingva informilo pri Esperanto. 4,20 gld.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando, ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la **minimuman mendosumon de 15,— guldenoj**. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 16% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj. Tamen, la sumo de la sendokostoj estas **minimume 3,— guldenoj**.



"ĈIU, kiu iasence konsideras sin serioza esperantisto kaj ne nur periferia hobiisto, povos profiti per studado de **ESPERANTO EN PERSPEKTIVO**; sed precipe tiuj el ni, kiuj deziras: ekzameni aŭ ekzameniĝi; instrui; verki pri Esperanto; maturstile kaj inteligente propagandi pri Esperanto en diversaj medioj, kaj armi sin kontraŭ demandoj, ne nur pri tiuj temoj, pri kiuj ni pro intereso kaj temperamento iom scias, sed pri tiuj temoj, kiuj ne rekte koncernas nin — sed ofte tre koncernas la demandanton."

Marjorie Boulton

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustropaĝoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libroservo de UEA.

Brazilo

• Inter la 15a kaj 18a de julio 1976, en Brazilio, la ĉefurbo de la plej vasta sudamerika ŝtato, okazos la 11a Seminario de Brazilaj Esperantistoj. Malgraŭ la tradicia nomo "seminario", temas fakte pri la plej prestiĝa jara aranĝo de la tutlanda Esperantomovado en Brazilo. La ĉi-jara Seminario okazos sub la alta protekto de la guberniestro de la federacia distrikto, s-ro Elmo Serejo Farias, kiu la 23an de aprilo akceptis la organizan komitaton de la Seminario. La guberniestro entuziasme subtenas la Seminarion kaj disponigis al ĝi 150 senpagajn partoprenlokojn (loĝado, manĝoj kaj urba transporto), plus pliajn 100 senpagajn dormlokojn. En Brazilio oni kalkulas pri partopreno de almenaŭ malgranda grupo da eŭropanoj, ĉar oni volus plue sondi eblecojn por en iu el la venontaj jaroj inviti Universalan Kongreson al Brazilo. **Sur la apuda foto** (de maldekstre): la guberniestro E. Serejo Farias, s-ro Newton Rossi, s-ro Jorge Cauhy kaj s-ino Ursula Grattapaglia, komitatano de UEA, unu el la organizantoj de la Seminario.

Britio

• En la semajno inter la 21a kaj 27a de aŭgusto, en Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ankaŭ ĉi-jare okazos la tradiciaj (ekde 1960) tri-gradaj Esperanto-kursoj, kun pluraj instruantoj, sub la gvido de la konata verkistino, akademianino Marjorie Boulton. La tri intensaj kursoj, celantaj ĉefe instruistojn, okazos samtempe en la komforta, moderna kolegio, kie oni ankaŭ loĝas kaj manĝos. Pliajn informojn petu ĉe: s-ro H. Barks, 25 Mars Street, Smallthorne, Stoke-on-Trent, ST6 1PA, Britio.

Francio

• En la 68a Kongreso de Francaj Esperantistoj, okazinta meze de aprilo en La Grande Motte, partoprenis ĉ. 200 personoj. I.a. oni traktis ankaŭ la nunan staton (v. nian martan numeron, p.57) de la franca leĝpropono pri nedeviga instruado de Esperanto en la francaj lernejoj.



Akcepto en la ĉefurbo de Brazilo: Valora subteno en la plej vasta sudamerika lando (v. la tekston ĉi tie maldekstre, sub "Loke")

Akademio

• El la ĵus aperinta kajero *Aktoj de la Akademio 1968-1974* ni eksciis, ke meze de februaro ĉi-jare elektigis sep novaj membroj de la Akademio de Esperanto: W. Bormann (FR Germanio), F. de Diego (Hispanio), M. Duc Goninaz (Francio), R. Eichholz (Kanado), V.P. Grigorjev (Soveta Unio), R. Haupenthal (FR Germanio) kaj A. Pettyn (Pollando). Nun la Akademio havas 45 membrojn.

Lingvoinstruado

• Laŭ antaŭnelonga deklaro de funkciulo de Alliance française – organizaĵo kiu okupiĝas pri la instruado de la franca lingvo en eksterlando – tiu lingvo perdas siajn internaciajn poziciojn. Tion oni i.a. rimarkas ankaŭ laŭ la fakto, ke la eksporto de la francaj libroj en 1975 malkreskis je 18% kompare al la antaŭa jaro. Laŭ la sama deklaro, nuntempe en eksterlando laboras ĉ. 32 000 instruistoj de la franca lingvo.

Kemiistoj

• Ĵus estas refondita Kemia sekcio de ISAE. La prezidanto de la sekcio fariĝis prof. d-ro S. Kawamura (424-7 Kinasyō Huzii, Takamatu 760, Japanio), komitatano de UEA, kaj la sekretario estas s-ro A. Gonĉarov (P.K.11, SU-656009 Barnaul-99, Soveta Unio). Laŭ informo de la prezidanto, oni celas logi al la sekcio

kemiistojn, kiuj okupiĝas pri la plej diversaj kemiaj branĉoj (fizika, neorganika, geologia, organika, biologia, medicina, ekologia, farmacia, agrikultura, analiza kaj ĉiuj industriaj kemioj).

Universitatoj

• Komence de aprilo, en Budapeŝto oni solene markis la dekan datrevenon de la Esperanta fako ĉe la Katedro pri ĝenerala kaj aplikita lingvistiko en la Universitato ELTE. Per siaj referaĵoj al la solenaĵo (inter la 5a kaj 8a de aprilo) kontribuis i.a. A. Bausani (Lingvistiko, interlingvistiko, esperantologio), H. Frank (Lingvoinstruado, instru-kibernetiko kaj planlingvoj), I. Szerdahelyi (Dek jaroj de la Esperanta fako), H.R. Tonkin (Esperanto, lingvo kaj literaturo, kiel objekto de scienca esplorado kaj universitata instruado), J. Uśpieński (La plurlingveco kiel socia problemoj kaj ĝia solvo) kaj P. Zlatnar (La spertoj kaj perspektivoj post la internacia Pedagogia-Didaktika Eksperimento).

Gazetaro

• *Heroldo de Esperanto*, populara internacia gazeto, kiu atingas preskaŭ kvar mil legantojn (nia revuo estas eldonata en pli ol 8000 ekzempleroj), ĵus eldonis specialan *Sciencan suplementon*, kiel senpagan aldonajon al sia 7a ĉi-jara numero. Temas fakte pri unu grandformata ekstra folio (45x30cm) kun artikoloj de M. Duc Goninaz kaj G.H. Sutton pri lingvistiko kaj de R. Lloancy pri etnologio.

N-ro 498, 1976 03 31

DU PLIAJ LANDAJ ASOCIOJ

La 31-an de marto 1976 finiĝis voĉdono de la Komitato de UEA pri la aliĝpetoj de du landaj Esperanto-asocioj. Ambaŭ petoj estis akceptitaj per 43 voĉoj favoraj, kun neniuj kontraŭ kaj neniuj sindeteno. Per tiu decido la nombro de aliĝintaj landaj asocioj de UEA atingis 34. La novaj aliĝintoj estas:

Islanda Esperanto-Asocio (Pósthólf 1081, Reykjavík) kaj Luksemburga Esperanto-Asocio (p/a s-ro A. Wickler, 17 rue St. Laurent, Lorentzweiler). Ambaŭ asocioj baldaŭ nomos reprezentanton en la Komitato.

KOTIZOJ POR URUGVAJO

Post la lastatempa ŝanĝo de la urugvaja valuto, ekvalidas por Urugvajo nova kotiztarifo, nome: MJ = 15,-; MA-K/MA = 30,-; MSZ = 90,-; J-MJ = 7,50; J-MA/SA = 22,50; Kontakto = 7,80 novaj pesoj.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

FRANC: F. Cherault.

SOCIETO ZAMENHOF 1976

US: 134 W.W. Glenny. FRANC: 135 A. Giovenal. HISP: 136 G. Flores Martin. FINN: 137 Liisi Oterma; 138 Joel Vilkki. NORV: 139 Margrete Landmark; 140 Olav Reiersøl. BELG: 141 André Degryse. SVED: 142 L. Lagerkrantz; 143 Erik Åkerlund; 144 A.H.L. Nilsson. DANL: 145 J. Pedersen. BELG: 146 F. Van

Ginderen-Martens. BRAZ: 147 Denise A. Deslandes. SVISL: 148 M.M. Pavlovič. BRAZ: 149 Álvaro Rabelo. NOV-ZEL: 150 V.R. Moore. BRIT: 151 G.B. Atkinson. NED: 152 R.H. Bossong. FRANC: 153 Fernand Charlet. PORT: 154 Antonio R. Correia.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA, ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1976 07 15 neniuj membroj pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

ARG: Hugo Antonio Lingua, D Rosario. AŬSTRAL: Eino Loores, VD Hobart; Mac Le Fevre, D kaj FD Launceston; Betty Cleminson, FD Manly. BRAZ: Sírío Silva, D Resende; Alan Romero, Elma Nascimento, FDoj Rio de Janeiro; Dirceu Porciúncula, D kaj FD Río Grande. BRIT: Roland Wilkins, FD Swansea. FRANC: Edmond Plutniak, D Bavin-court. FRG: Hans Jürgen Feilke, FD Bremen. IRL: Frank Dobbs, FD Dublin. ITA: Maria Carla Cacciola, D Alessandria. JAP: Tadakatsu Yuri, D Ashiya. NED: Wessel Grolleman, D Arnhem. USO: Andrew Behrens, D Thetford.

DONACOJ 1976 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Usono: Heredaĵo Ralph Bonesper 5354,35. Sumo ĝisnuna 6782,48.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Anonime 50,-. Sumo ĝisnuna 636,88.

FONDAĴO CANUTO: Anonime 50,-. FR Germanio: Josef Eder 103,73. Nederlando: Flach 45,-. Svedio: Klara Walder 97,56. Sumo ĝisnuna 863,58.

ĜENERALA KASO: Anonime 5,-. Anonime 20,-. Anonime 96,20. Belgio: F. van Ginderen-Martens 50,-. Danlando: Henrick Wissing 5,12. FR Germanio: Josef Eder 103,73. Japanio: Kazuko Kikušima 24,-. Nederlando: I.M.F. Dijkhoff-Lenze 100,-; N.L. Daams 10,-. Usono: Nels Nelson 2,68; Alvin Nering 2,68; Elfrieda Walters 18,33. Sumo ĝisnuna 1423,57.

PATRONA MEMBRO DE TEJO, 1975: 30 Margrete Landmark, Norvegio.

PATRONA MEMBRO DE TEJO, 1976: 13 Margrete Landmark, Norvegio.

FONDAĴO TEJO: Anonime 2500,-. Sumo ĝisnuna 2563,64.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Ekzameno

E

Redaktas:
Bernard Golden,
Csikász u. 11.III.3
H-8200 Veszprém, Hung.

RESPONDO 2

(pri la demando v. nian aprilan numeron, p. 80)

- ONWARD estis la vaporŝipo de la postkongresa ekskurso en aŭgusto 1905. Ĉe la fino de la Unua Universala Kongreso de Esperanto, ĉirkaŭ 300 kongresanoj veturis de Bulonjo-ĉe-Marŝo trans La Manikon al la anglaj urbetoj Folkestone kaj Dovero kaj revene al Kalezo, Francujo. D-ro Zamenhof estis unu el la pasaĝeroj.
- La 2an de aŭgusto 1910 d-ro L.L. Zamenhof enŝipiĝis en Bremeno. Li veturis sur la ŝipo GEORGE WASHINGTON, kiu, post haltoj en Ĉerburgo kaj Southampton, atingis Novjorkon la 11an de aŭgusto. De Novjorko li iris al Vaŝingtono por partopreni en la 6a Universala Kongreso de Esperanto.
- Post la 6a Universala Kongreso d-ro L.L. Zamenhof vojaĝis en Usono

Esperanto-dokumentoj

Denove aperas studoj kaj superrigardoj pri la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado. Simile al siatempaj CED-dokumentoj, la novaj, belaspektaj, presitaj, broŝurformaj (formato A5) dokumentoj prezentas nemalhaveblan konsultmaterialon por ĉiu serioza aktivulo en la kampo de la Internacia Lingvo.

Esperanto-dokumentoj aperas en du paralelaj serioj — angla-lingva kaj Esperanta. Abonprezo por serio de 10 dokumentoj en unu el la du lingvoj estas 25,— (por Nederlando 26,—) gld. Abonu ĉe niaj kutimaj kotizperantoj aŭ rekte ĉe: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.

kaj Kanado antaŭ ol reiri al Eŭropo en septembro. La ŝipo, kiu portis lin estis la KAISERIN AUGUSTA VICTORIA, kiu forlasis Nov-Jorkon la 3an de septembro 1910 kaj alvenis Hamburgon la 12an.

ĉ. La 27a Universala Kongreso okazis en Italujo en 1935. Post la kongreso, krozado estis organizita sur la ŝipo SINAIA. Laŭ la priskribo de Julio Baghy, ĝi estis "franca ŝipo kun rumana nomo luata de italoj kaj ĝuata de Babel-tura popolo". De Napolo la krozantoj veturis sur la Tirena Maro, tra la Mesina Markolo al Malto, Tripolo, Sicilio kaj revene al Ĝenovo.

d. La 41a Itala Kongreso de Esperanto en septembro 1970 estis organizita kiel krozad-kongreso sur la motor-ŝipo CARIBIA. La esperantistoj ekveturis de Ĝenovo por krozi

ĉirkaŭ la okcidenta Mediteraneo. Surteraj ekskursoj okazis en Barcelono, Palma (Majorko), Kartago (Tunizio), Palermo (Sicilio) kaj la insulo Kapreo apud Napolo.

DEMANDO 3

(la respondo aperos en la junia numero de nia revuo)

Ĉi tiu demando koncernas kvin fervojajn vojaĝojn, kiuj okazis sur la paĝoj de noveloj aŭ romanoj verkitaj originale en Esperanto. Ĉu vi scias la nomon de la verko kaj la aŭtoro?

a. Dum turisma vojaĝo eksterlande junulino iras per vagonaro tra tunelo. En la mallumo fremda viro kisas ŝin kaj rezulte de tio ŝi esperantistiĝas.

b. Familio de orienteŭropa lando vojaĝas per fervojo al Aŭstrio. La vojaĝo finiĝas tragike ĉe la landlimo,

ĉar mankas enirvizo en iliaj pasportoj.

c. Ĉe la komenco de la unua mondmilito, franca junulo en Germanujo provas eskapi kaj reiri al Francujo. Li intencas veturi per trajno ĝis la landlimo, sed devas elvagoniĝi en la urbo Metz.

ĉ. Tribunala funkciulo, tedita pro la ĉiutagaj rutinaĵoj, prenas unutagan libertempon por vojaĝi vagonare al banloko apud lago. Survoje li amindumas junan virinon kaj ŝi akompanas lin al la somerumejo, sed la ekirigita amafero ne tute sukcesas.

d. Mondvojaĝanto sidas en triaklasa kupeo dum longa fervoja vojaĝo. Unu el liaj kunvojaĝantoj estas dekjara knabino. Li rakontas al ŝi pri sia hobbio, kiu konsistas en la kolektado de speco de meteologia fenomeno.

Anoncetoj

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,75 gld. (1 internacia respondkupono). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.

Skandinavia aviadila karavano unusemajna al Ateno de la 31a de julio ĝis la 7a de aŭgusto per koneksaj aeroplanoj en Arlanda, Torslanda, Malmö kaj Kopenhago. Petu informojn kaj aliĝilojn: S-ro E.W. Anjou, Södra vägen 6, S-412 54 Gotenburgo, Svedio.

Kolektanto serĉadas kaj interŝanĝadas biero-subumojn bonstatajn el la tuta mondo. Mi kontraŭdonas ankaŭ p.m. Harry Borchert, D-330 Goslar 2, Hindenburgstr. 4, FRG.

5-a BELGA KARAVANO al la Universala Kongreso, de la 24a de julio ĝis la 15a de aŭgusto: Unika vojaĝo tra Germanujo, Aŭstrujo, Jugoslavio, Greklando kaj Bulgarujo per moderna klimatizita aŭtoĉaro kun partopreno en la 20a Jugoslava Kongreso en Prilep, kun multaj vizitoj sub gvidado (i.a. en Dubrovnik, Meteora, Delphi, Thessaloniki, Sofia) kaj ĉeesto al du folkloraj festoj ktp. 23 tagoj en unuaklasaj hoteloj sen kromaj kostoj (escepte de la kvin-taga restado en Ateno) por 16 900 BF (loĝado en Ateno kun la grupo kostas suplementon de 3750 BF). La partoprenontoj estas nur esperantistoj kaj ili venas el ses landoj! Ankoraŭ 5 lokoj! G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgujo.

Ekslibrisojn interŝanĝas kaj kolektas por ekspozicio el ĉiuj landoj, rekomencas per pm.: Jenő Zágoni (bibliotekisto), Căsuța Poștală, 10, R-4000 Sfîntu Gheorghe, Rumanio.

Ĉiaspecajn poŝtmarkojn daŭre akceptas la Centra Oficejo de UEA (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando) por disvendo favore al la asocia kaso. Ni petas vin konservi la poŝtmarkojn de sur viaj leteroj, kolekti ilin de viaj amikoj kaj lokaj firmoj, kaj sendi ilin al la C.O. Antaŭdankon!

Deziras korespondi kaj interŝanĝi uzitajn p.m.: Mehmet Telyakar, Aydınlık sok No.23, Ortaköy-İstanbul, Turkio.

Trikolora glumarko, profesie moderna, distinge impresa pri SAT-kongreso en Gotenburgo, 24 – 30a de julio 1976. Folio kun 10 markoj Skr. 2,50 (aŭ 2 rpk) inkl. sendokostojn. Sveda poŝtĝiro 51 57 85-4, Ivar Paulsson, Algatan 3, S-171 33 Solna, Svedio. Petu samtempe informilon pri la kongreso.

Esperantistaj kolektantoj: Senpaga registrado en niaj listoj tutmonde disvastigataj. Detalojn, klarigojn kontraŭ unu irk. R. Melo, Moulin du Milieu, Cinq Mars, F-37130 Langeais, Francio.

Ofertas senpage estontecan romanon, al E-kluboj inter Bruselo kaj Tokio, kun celo traduki alilingven. Skribu al: M. Ronsmans, 69 Solleveld, B-1200 Bruselo, Belgio.

Usona komencanto, emerita armea serĝento, serĉas interesajn hungarajn korespond-geamikojn: S-ro Howard-Clay Morris, 12001 Tulip Grove Drive, Bowie, Maryland, 20715, Us.

Stojan Šopov, delegito de UEA, P. K. 132, BG-7700 Târgoviște, Bulgario, deziras korespondi tutmonde.

ADRESSANĜO TONKIN: Bonvolu noti, ke la aktuala (brita) adreso de la prezidanto de UEA validas nur ĝis la fino de junio. Post tiu dato kaj ĝis la mezo de aŭgusto, skribu al li ĉe la Centra Oficejo en Rotterdam. Ekde la mezo de aŭgusto lia adreso estos denove: 35 Violet Lane, Lansdowne, PA 19050, Usono; telefonnumero: (215) CL9-8821. Skribante al la usona adreso, ĉiam sendu leterojn aerpoŝte. Por gazetoj kaj neurĝaj korespondaĵoj, bv. uzi la usonan adreson jam ekde la fino de junio.

En agrabla, histoririĉa franca regiono
LA ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo GRESILLON, F-49150 Baugé, Francujo
baldaŭ malfermos siajn pordojn
por intensa somera aktivado

Laŭ la restantaj disponeblaj ĉambroj, ankaŭ vi
povas enskribiĝi kaj elekti el la programo:

Unua periodo: **ESPERANTISTAJ SEMAJNOJ**
de la 2a ĝis la 22a de julio:

Trigradaj kursoj, preparado por ekzamenoj, man-
aktivaĵoj, konversacioj, distraĵoj, promenadoj.

Dua periodo: **INTERNACIAJ SEMAJNOJ**
de la 23a de julio ĝis la 12a de aŭgusto:

Diverstemaj prelegoj, Esperanto-kurso per rekta
metodo, diskutoj pri prelegoj, man-aktivaĵoj, distraĵoj,
interesaj promenadoj kaj ekskursoj.

Tria periodo: **STUDSEMAJNOJ**
de la 13a de aŭgusto ĝis la 2a de septembro:

Sama programo, kiel dum la unua periodo.

En ĉiuj periodoj, plej diversaĝaj partoprenantoj
kaj iliaj familianoj povas trovi en Gresillon kaj
ĝiaj 14 hektaroj de verdaĵo, ripozon, amuz-
diversecon, partopreni ekskursojn.

Informoj kaj aliĝoj je la ĉi-supra adreso.

UEA serĉas du novajn oficistojn

por respondecaj funkcioj en la Centra
Oficejo (ĝenerala administranto de la C.O.
kaj Konstanta Kongresa Sekretario).

Bezonataj kvalitoj estas iniciatemo,
administra kaj komerca talento, flua sci-
povo de Esperanto kaj laŭeble ankaŭ de
aliaj lingvoj.

La salajroj kaj datoj de eklaboro estas
interkonsentotaj. Sinproponoj estu
direktitaj kiel eble plej baldaŭ — prefere
antaŭ la 30a de junio — al la direktoro
de la C.O., Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando.

Por pliaj detaloj vidu la artikolon de
la prezidanto sur la paĝo 81.

Svislando

LA 17a EŬROPA FERIOSEMAJNO
okazos
de la 12a ĝis la 18a de septembro 1976
en **MAGLIASO**
apud la lago de **LUGANO**

El la programo: Antaŭtagmezaj Esperanto-lec-
ionoj diversgradaj, gvidataj ekskursoj variaj,
vesperaj aranĝoj distraj, moderna restadejo kun
propra naĝejo hejtebla.

Geesperantistoj de ĉiu aĝo estu bonvenaj!

Anoncojn kaj informpetojn oni direktu al:
Ernst Glättli, SAEF-sekretario, Laurstr. 17,
CH-5200 Brugg (Svislando).

Svislando

Novaj dokumentoj mendeblaj kvante

Jam aperadas la novaj *Esperanto-dokumentoj* kaj
ilia anglalingva ekvivalento *Esperanto Documents*.
Ambaŭ serioj estas aboneblaj, po 25,—gld. por 10
numeroj. Por faciligi vastan utiligon de tiuj mat-
erialoj UEA proponas specialajn prezojn por
kvantaj mendoj de unuopaj dokumentoj (aldon-
iĝas 10% por sendokostoj):

1-2 ekz.	po 3,—gld.	200-299 ekz.	po 1,50gld.
3-99 ekz.	po 2,—gld.	300-399 ekz.	po 1,25gld.
100-199 ekz.	po 1,75gld.	400-500 ekz.	po 1,—gld.

Ĝisnunaj titoloj:

- 1A Esperanto and the UEA
- 2A Universal Esperanto Assn., Annual Report 1974-75
- 3A The 60th Universal Congress of Esperanto
- 4A The development of poetic language in Esperanto
- 5A The contribution of the Universal Esperanto
Association to world peace
- 6A An introduction to Esperanto studies
- 7A Esperanto on the air
- 1E Pri la kontribuo de UEA al la laboro de Unesko,
1954-1974
- 2E La kontribuo de UEA al la monda paco
- 3E Esperanto tra la etero
- 4E Enkonduko al Esperanto-studoj

Olimpika donas amikan Greklandon antaŭ la alveno

Flugo kun Olimpika signifas
unuarangan servadon,
la plej modernan ekipaĵon,
bongustegajn manĝojn
kaj la malnovan tradician gastamon.

Ĉion bezonatan, por ke vi sentu vin hejme.
Kaj, kiam vi alvenos en Greklando, permesu, ke ni montru
ĝin al vi, kiel nur ni kapablas tion fari.

Ni helpas al vi elekti vian propran lokon sub la suno,
el inter la 34 lokoj sur la tero kaj insuloj de Greklando,
al kiuj ni flugas.

Venu flugi kun ni kaj ĝui nian Olimpikan gastamon.
Ĉar ni estas la moderna flugkompanio
kun la antikvaj grekaj tradicioj.

flugkompanio
OLYMPIC

La oficiala flugkompanio de la 61a Universala Kongreso

